



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Oktoebro 2016 n-ro: 10



Merhaba!

Okullar açılmak üzere. Belki bu sene de Ekim ayı ortalarından itibaren yeni bir Esperanto kursuna başlayabileceğiz.

Ekim sayımızın en güzel yazısını Almanya'dan yeni arkadaşımız bay Fritz-Ferdinand L. Palatinus gönderdi. Yazı 26 yaşında genç yaşta ölen müthiş bir yazar Wolfgang Borchert'in kaleme aldığı kısa bir hikayenin tercümesi: "Fareler de gece uyurlar". II Dünya Savaşı Almanya'sından dokunaklı bir hikaye. Kaçırmanın.

Fransa'dan bayan arkadaşımız Paule Burnel ve Alanya'da yaşayan Hollandalı arkadaşımız Fons Doomen de kısa birer yazı ile bu sayımıza katkıda bulundular. Paule Burnel'in "Neden bu kadar 'komencanto' var?" yazısı çok önemli.

İyi okumalar...

Saluton!

Lernejoj baldaŭ malfermiĝos. Eble ĉi jare ankaŭ ekde la mezo de oktobro ni komencos novan kurson de Esperanto.

La plej belan verkaĵon de nia oktobra numero sendis nia nova amiko el Germanujo Fritz-Ferdinand L. Palatinus. Ĝi estas tradukaĵo de rakonto de germana elstara verkisto Wolfgang Borchert, kiu mortis tre juna je la aĝo de 26: "Dumnokte ja dormas la ratoj". Tre kortuŝa rakonteto el Germanujo de la Dua Mondmilito. Ne maltrafu ĝin.

Plue, nia amikino Paule Burnel el Francujo kaj nia amiko Fons Doomen el Nederlando, kiu loĝas en Alanya urbo, kontribuis ĉiu per unu mallonga verkaĵo al ĉi tiu numero. La artikolo de Paule Burnel "Kial tiom da komencantoj?" estas tre grava.

Bonan legadon...



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Saluton	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Novaĵoj el MONA	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de geamikoj	4
Ferii ekster Turkujo	4
DUMnokte ja dormas la ratoj	4
Kial tiom da komencantoj	7
Dekdu argumentoj kontraŭ kaj pro Eo	8
Malnovaj grekaj Mitoj: La Diluvo	9
Ĉu EU sen la angla?	11
Forpasis Detlev Blanke	12
Forpasis Reinhard Selten	12
La lingvo serena de Baldur Ragnarsson	13
Olimpikaj Ludoj, la Metaforo	14
Kial kaj kiel mi lernis Esperanton?	15
Poemoj de Espopore	16
Poemo de Pedro Salinas	16
Ŝercoj, Enigmo, Krucvort-enigmo	17
Veganarto: Strogonofo el veĝetaĵoj	18
Vilaĝanoj mistere vivas subtere	19
La junaj detektivoj (5)	20
Mallonga Filozofio de Historio (9)	22
El la libro de "Dao De Jing" (3)	23
Esperanto Kurso (10)	24
Malfermo	28

Kursoj



Nuntempe kursoj ne okazas pro la somerumado kaj feriadoj. Ni esperas ke ili komencigos denove dum oktobro.

Komisiono de UEA por agado en landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko Alvokas



Alvoko de Renato Corsetti pri disvastigo de Esperanto en arablingvaj landoj

En la lasta jardeko la komisiono de UEA pri tiu laborkampo atingis kelkajn rezultojn sed la situacio de la parolantoj de Esperanto en arablingvaj landoj restas tre malforta laŭ la nombro de la parolantoj.

Nun ni volas redoni impulson al la agado. Pro tio ni volas transformi nian provizoran paĝon <http://esperanto-arab.jimdo.com/> al tre pli bela paĝo, krei belan flugfolion kaj retan tekston pri Esperanto en la araba, kaj intensigi la sendadon de lernolibroj en la araba al petantoj. Imagu, ke ni ricevis lastatempe petojn el Damasko, Sirio. Rifuzi sendi lernolibrojn de Esperanto al Sirio egalas al favorado de plua militado tie.

Intertempe ni ankaŭ okupiĝas pri aliaj mezorientaj regionoj kaj nun celas fejbukan kampanjon por renaskigi el la cindroj la Esperanto-movadon en Azerbajĝano. Rigardu la paĝon "Esperanto Azərbaycanda" en Fejsbuko.

Malgraŭ la financa helpo de UEA ni ankaŭ bezonas helpon de unuopaj esperantistoj, kiuj pensas, ke ni semu kaj semu konstante. Sendu vian esencan eĉ se malgrandan kontribuon al la konto "arabio" ĉe UEA. Pagmanieroj en <http://www.uea.org/alighoj/pagmanieroj>. Indiku "por arabio".

الإسبرانتو في الدول العربية

Ĉu ni amas kaj lernas Esperanton?

www.lernu.net

Ni atendas leterojn de geamikojn



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

Esperanto-Sumoo



La septembra Esperanto-Sumoo okazis inter la 11-a kaj 25-a de septembro kaj finiĝis sukcese. 250

homoj el 26 landoj legis entute 15,000 paĝojn kaj konstruis multe al la movado kaj librovendado en Esperantujo. Jen estas la 10 plej grandaj sumoo-landoj:

1. Japanio: 65
2. Francio: 34
3. Koreio: 33
4. Brazilo: 15
5. Pollando: 15
6. Vjetnamio: 14
7. Rusio: 9
8. Hispanio: 7
9. Finnlando: 6
10. Nederlando: 6

Bedaŭrinde nur unu leganto partoprenis el Turkujo.

La novembro Esperanto-sumoo okazos inter la 13-a ĝis la 27-a. Ni atendas vian partoprenon!

Jen ligilo por la retejo de la Esperanto-Sumoo:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

Jen ligilo por la facebookgrupo Esperanto-Sumoo:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo



UEA



Gazetaraj Komunikoj de
UEA
N-ro 631
2016-08-20

RESPONDECOJ DE LA UEA-ESTRARANOJ

La Estraro de UEA decidis pri la laborkampoj de siaj membroj:

Mark Fettes (Prezidanto):

Strategio, Kunordigo, Statuta Reformo, Esploro kaj Dokumentado, Faka kaj Scienca Agado;

Stefan MacGill (Vicprezidanto):

Instruado, Jaro de la Lernanto, Meza Oriento kaj Norda Afriko, Rilatoj kun Membro-Organizoj kaj Ĝemelaj Urboj;

Martin Schäffer (Ĝenerala

Sekretario): Financoj, Administrado, Retejoj kaj Retlistoj, Ameriko;

Emilio Cid: Informado, Amikoj de Esperanto kaj Zamenhof-Jaro;

Lee Jungkee: Azio, Afriko kaj Esperanto-Centroj;

Sara Spanò: Eksteraj Rilatoj, Aktivula Maturigo, Eŭropo, Terminologio, Kulturo kaj Kongresoj.

Fonto:

<http://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Respondecoj-de-la-UEA-estraranoj>

TEJO



IJK 2017 EN TOGOLANDO!

La TEJO-Estraro elektis la kongresan urbon por la 73-a IJK an Afriko. Aneho, urbo en la sud-oriento de Togolando tuj apud Atlantiko, gastigos la IJK-partoprenantojn de la 5-a ĝis 12-a de aŭgusto 2017. La urbo situas 45km for de la ĉefurbo kaj lime al Benino.

Fonto:

<http://tejo.org/2016/08/ijk-2017-en-togolando/>

NOVAJ OFICISTOJ DE TEJO

La stabo de TEJO kreskas el novaj oficistoj kiuj fakte helpas la laboron de nia organizo en la postenoj de komputilisto, grafikisto kaj merkaticisto.

Komputilistoj:

- Abel Johannes "Joop" KIEFTE
- Baptiste "Batis" DARTHENAY

Grafikisto:

- Przemysław "Przemek" WIERZBOWSKI.

Merkaticistoj:

- Besenyei Eszter "Stela"
- Łukasz "LukiZ" ŻEBROWSKI
- Peter "Petro" BALÁŽ

Ĉiuj oficistoj estas eŭropaj civitanoj kaj ilia dungado estas kunfinancata de Eŭropa Unio tra la programo Erasmus+. Ili laboras ekde la 1a de septembro ĝis la 31a de decembro. Ni bondeziras al ili ĉiuj bonan laboron kaj antaŭĝojas la antaŭensalton kiun profito nia movado danke al ilia kvalita kaj sindediĉa laboro.

Fonto:

<http://tejo.org/2016/09/novaj-oficistoj-de-tejo/>

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Saluton,

Vian revuon mi trovis per interreta serĉo, kian mi kelkfoje faras, mi serĉis

interretajn Esperantajn gazetojn, magazenojn, gazetojn, kaj google donis al mi jen:

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revueto/>

Do kelkfoje mi vizitas vian paĝon, kaj vere, via gazeto estas altekvalita, gratulon. Mi legis ĉiun eldonon ĝis nun.

Mi deziras al vi obstinon kaj bonan sukceson en la redaktado de la Turka Stelo.

Amikajn salutojn sendas,

Fritz-Ferdinand L. Palatinus (Germanujo)

Ferii ekster Turkujo



Por okcident-Eŭropanoj ferii en Sud-Eŭropaj landoj estas kutima afero. Kiel turistoj ili vojaĝas al landoj kiel Hispanujo, Francujo, Italujo kaj ... Turkujo.

Bedaŭrinde, pro diversaj kialoj la turisma sezono por Turkujo estis katastrofa dum la lasta somero. Estis multaj plendoj el la Turka turisma industrio, hoteloj, restoracioj, grandaj kaj malgrandaj butikoj, kaj apenaŭ estis vizitantoj kaj klientoj. Granda problemo por la multaj turkoj kiuj devas perlabori sian monon en tiu sezono por vivteni en la vintro.

Por ni, mia edzino Ineke kaj mi, la somero estas ĉiam le sezono por forflugi el Turkujo. Ni vivis en Nederlando kaj antaŭ sep jaroj elmigris el tiu lando al Turkujo post nia emeritiĝo. Ni vivas en Alanya, bela urbo en la suda parto de Turkujo, en la provinco Antalya, kie troviĝas multe da plaĝoj por la sunamantoj. Kvankam ni ne apartenas al tiu kategorio ni kun plezuro vivas en Alanya, almenaŭ dek monatoj el la dek du. En la pinto de la somero, inter meze de julio kaj la fino de aŭgusto, la varmego estas por ni preskaŭ netolerebla kaj tiam vi ne trovos nin en nia Alanya domo. Ni havas almenaŭ du lokojn por iri en tiu periodo: Skotlando kaj Nederlando.

Skotlando ĉar tie vivas nia filino kaj ŝia edzo, kaj niaj genepoj: du knaboj de 10 kaj 3, kaj knabino de 12. Ili vivas en Inverness, urbo ne malproksime de la fama Loch (Lago) Ness kaj de la Atlantika Oceano. Kaj ankaŭ je la komenco de la Skotaj Highlands (Altaj Landoj). Bedaŭrinde la lando estas ankaŭ fama pro la multaj pluvoj kaj malaltaj temperaturoj. Ankaŭ ĉi-jare, kiam ni estis en Inverness dum la lastaj semajnoj de julio kaj la unuaj de aŭgusto nin trafis multe da pluvo kaj ventego. La temperaturoj tie estis ĉirkaŭ 16 bis 18

Sendis Fons Doomen el Turkujo/Nederlando

gradoj, kompare kun la 35 gradoj en Turkio.

Ĉiam estas aventuro iri de Alanya al Inverness. Ĉi-jare ni iris taksie al la centro de Alanya, de tie per buso al la flughaveno de Antalya, kaj poste al la flughaveno Atatürk/Istanbul. La sekvanta etapo estis de Istanbul al Londono/Luton kaj fine de tie, de Londono, al Inverness flughaveno, kie nia familio nin atendis por eskorti nin al sia domo. Kaŭze de la malbona vetero ni ne havis multajn eblecojn por iri ekster la domo, ekzemple por butikumi en la centro de Inverness aŭ viziti ludparkon kun la genepoj.

Je la mezo de aŭgusto ni per trajno iris de Inverness al Edinburgh, de kie ni flugis al Amsterdam Schiphol flughaveno. Trajne ni iris al Utrecht, en la centro de Nederlando por tie resti dum kelkaj tagoj ĉe nia filo kiu loĝas en tiu vigla urbo. Tiam la vetero ĉiam pliboniĝis, estis eĉ varma (25°). Ni tie pasis kelkajn agrablajn tagojn, faris kelkajn ekskursojn, kaj poste iris al Tilburg, urbo en la suda parto de Nederlando, kie loĝas kelkaj familianoj de mia edzino Ineke kaj de mi. Ni tie restis en airbnb adreso kiun ni antaŭe rezervis. Fine ni reiris al Utrecht kaj de tie estis aŭte portataj per nia filo al la flughaveno de Amsterdam por reflugi al Alanya/Gazipaşa flughaveno, la unuan fojon ke ni alvenis al tiu flughaveno. Alvenante ni jam konstatis ke la altaj temperaturoj ankoraŭ daŭras – en la momento mi skribas tiun ĉi tekston, en la mezo de septembro, ankoraŭ estas 32 gradoj...

Parenteze, mia edzino ne povas atendi por revidi la genepojn kaj jam rezervis flugon de Antalya al Glasgow kaj trajnvojaĝon de Glasgow al Inverness por la mezo de oktobro.

**Alanya, 14a de Septembro 2016.
Fons Doomen (Turkujo/Nederlando)**



La fenestra kavo en la nun soleca muro oscedis bluruĝe plena de fruvespera suno. Polvnuĉaĵo flirtis inter la krute sin etendantaj restoj de la kamentuboj. La ŝtonruba dezerto dormetis.

Liaj okuloj restadis fermaj. Subitfoje eĉ pli malhelis. Li sentis, ke iu venis kaj nun staras antaŭ li, malhele, mallaŭte. Nun ili min kaptas! li pensis. Sed kiam li iomete palpebrumis, li vidis nur du mizere pantalonitajn kruojn. Tiuj sufiĉe kurbaj staris antaŭ li, ke li povis travidi inter ili. Li riskis palpebrumeton supergrimpe la pantalonkruojn, kaj distingis iom maljunan viron. Tiu havis tranĉilon en la mano kaj korbon. Kaj iomete da grundo je la fingropintoj.



"Vi do dormas ĉi tie, ĉu?" La viro demandis kaj desupre rigardis la harhirtaĵon. Jurgen palpebrumis tra inter la kruoj de la viro en la sunon kaj diris: "Ne, mi ne dormas. Mi devas gardi ĉi tie."

La viro kapjesis: "Nu, por tio verŝajne vi havas ĉi grandan bastonon, jen?"

"Jes", respondis Jurgen kuraĝe kaj forte tenis la bastonon.

"Kion vi do gardas?"

"Tion mi ne povas malkaŝi." Li tenis la manojn forte ĉirkaŭ la bastono.

"Ĉu monon, supoze?" La viro metis la korbon teren kaj viŝis la tranĉilon tien kaj reen sur liaj pantalonkruoj.

"Ne, tute ne monon", diris Jurgen kun abomeno. "Ion tute alian."

"Nu, kion do?"

"Mi ne povas malkaŝi. Ja ion alian."

"Nu, lasu do. Tial mi kompreneble ankaŭ ne diras al vi, kion mi havas en la korbo, jen." La viro ektuŝis la korbon per sia piedo kaj klapfermis la tranĉilon.

"Pah, jam povas imagi, kio estas en la korbo," Jurgen menciis malestime. "Manĝaĵo por kunikloj."

"Fulmotondro, jes!" la viro diris kun miro, "vi ja estas sprita knabo. Kiom vi aĝas?"

"Naŭ." "Oha, imagu, naŭ do. Tiam vi certe scias, kiom estas trifoje naŭ, ĉu?"

"Klare", diris Jurgen kaj por gajni tempon, li ankoraŭ diris: "Ja estas tute facila tasko." Kaj li rigardis tra inter la kruoj de la viro. "Trifoje naŭ, ĉu ne?" li denove demandis, "dudeksepe. Tion mi tuj sciis."

"Prave", diris la viro, "kaj ĝuste tiom kuniklojn mi havas." Jurgen faris rondan buŝon: "Dudeksepe?"

"Vi povas rigardi ilin. Multaj ankoraŭ estas tute junaj. Ĉu vi volas?"

"Mi ja ne povas. Mi devas ja gardi", diris Jurgen ŝancele. "Ĉiutempe?" demandis la viro, "ankaŭ dumnokte?"

"Dumnokte ankaŭ. Ĉiutempe. Ĉiam." Jurgen suprenrigardis laŭ la kurbaj kruoj.

"Jam de sabato," li flustris.

"Sed ĉu vi neniam iras hejmen? Vi ja devas manĝi."

Jurgen levis ŝtonon. Tie kuŝis duona pano kaj ladskatolo. "Vi fumas?" demandis la viro, "ĉu fakte vi havas pipon?"

Jurgen forte sin kroĉis al sia bastono kaj diris feble: "Mi rulumas. Pipon mi ne ŝatas."

"Domaĝe", la viro sin klinis al sia korbo, "la kuniklojn vi volonte povus rigardi. Antaŭ ĉio la junajn. Eble unun vi eĉ elektus. Sed vi ja ne povas foriri de ĉi tie..."

"Ne", diris Jurgen malĝoje, "ne, ne."

La viro levis la korbon kaj rektiĝis. "Nu jes, se vi devas resti ĉi tie - domaĝe." Kaj li sin forturnis.

"Se vi min ne perfidas", rapide jen diris Jurgen, "estas pro la ratoj." La kurbaj kruroj revenis paŝon: "Pro la ratoj?"

"Jes, ĉar ili ja manĝas de la mortintoj. De homoj. De tio ili ja nutriĝas."

"Kiu diras tion?"

"Nia instruisto."

"Kaj vi nun gardas la ratojn?" demandis la viro.

"Sed tute ne tiujn!" Kaj tiam li diris mallaŭtege: "Nu, mia frato, tiu kuŝas ĉi sube. Jen." Jurgen montris per la bastono al la kolapsintaj muroj. "Nia domo ricevis bombon. Subite la lumo malestis, en la kelo. Kaj li ankaŭ. Ni poste ja vokadis lin. Li estis multe pli eta ol mi. Nur kvarjara. Li nepre estas ĉi tie ankoraŭ. Li estas ja multe pli eta ol mi."

La viro desupre rigardis la harhirtaĵon. Sed tiam subite li diris: "Ho, ĉu via instruisto tute ne diris al vi, ke la ratoj dormas dumnokte?"

"Ne", flustris Jurgen kaj la saman momenton aspektis tute laca, "tion li ne diris." "Nu", diris la viro, "tiu do estas stranga instruisto, se eĉ tion li ne scias. Dumnokte la ratoj ja dormas. Dumnokte vi trankvile povas iri hejmen. Dumnokte ili ĉiam dormas. Kiam malheliĝas, jam."

Jurgen per sia bastono faris malgrandajn kavaĵojn en la gruzon. Multaj malgrandaj litoj estas tiuj, li pensis, multaj malgrandaj litoj, ĉiuj.

Tiam diris la viro (kaj siaj kurbaj kruroj dum tio estis tute maltrankvilaj): "Ĉu vi scias, kio nun? Nun mi rapide manĝigas miajn kuniklojn kaj kiam fariĝos malhela, mi venos kunpreni vin. Eble mi ja povas kunporti unun. Unu malgrandan, aŭ kion vi opinias?" Jurgen faris malgrandajn kavaĵojn en la gruzon. "Multaj kunikletoj. Blankaj, grizaj, blankagrizaj. Mi ne scias", li diris kaj rigardis la kurbajn krurojn, "sed se fakte ili dormas dumnokte."

La viro grimpis super la restojn de la muroj al la strato. "Kompreneble", li de tie diris, "via instruisto paku kaj foriru, se eĉ tion li ne scias."

Tiam Jurgen ekstaris kaj demandis: "Se mi unun povus ricevi? Unu blankan eble?"

"Mi volas provi ĉu", diris la viro, jam dum foriri, "sed tiom longe vi devas resti ĉi tie. Mi tiam iros kun vi al via hejmo, vi sciu. Mi devas ja diri al via patro, kiel oni konstruas tian kuniklan stalon. Ĉar tion vi ja devas scii."

"Jes," vokis Jurgen, "mi atendas. Mi ja devas gardi ĝis malheliĝas. Mi tute certe atendas." Kaj li vokis: "Ni ankoraŭ havas bretojn hejme. Kestajn bretojn," li vokis.

Sed tion la viro jam ne plu aŭdis. Li kuris per siaj kurbaj kruroj al la suno. Tiu jam estis ruĝa pro la vespero, kaj Jurgen povis vidi, kiel ĝi radiis tra inter la kruroj, tiom kurbaj ili estis. Kaj la korbo ekscitite ŝancelis tien kaj reen. Kunikla manĝaĵo estis en ĝi. Verda kunikla manĝaĵo, tiu estis iomete griza pro la ŝtonrubo.

Tradukis kaj sendis nia amiko Fritz-Ferdinand L. Palatinus el Germanujo



*Wolfgang BORCHERT
(1921-1947) estis
germana verkisto.*

La filo de instruisto kaj verkistino en la aĝo de 15 jaroj komencas verki poemojn. Konforme al la deziro de siaj gepatroj li en la jaro 1939 komencas lerni la profesion de librovendisto, sed unu jaron poste li forlasis tiun

ĉi karieron por fariĝi aktoro. En marto 1941 li eklaboras en la Lüneburga teatro Landesbühne Osthannover, sed jam en junio de la sama jaro la militservo vokis lin al la fronto.

La sekvajn jarojn karakterizis malsanoj, vundoj, restadoj en lazaretoj kaj akuzoj pri memvundigo kaj defetismaj paroloj. En 1945 Wolfgang Borchert sukcesis fuĝi el la franca militkaptiteco kaj reveni al Hamburgo. Denove li agis kiel aktoro, reĝisoro asistanto kaj kabaredisto, ĝis kiam lia malbona sanstato malebligis tion.

Ekde 1946 – la kuracistoj prognozis al li unu plian vivojaron – li ege fervore dediĉis sin al la verkado. En rapida sinsekvo estiĝis prozaĵoj kaj poemoj, kiuj respegulis la spertojn de la aŭtoro kaj de multaj aliaj soldatoj revenintaj el la Dua mondmilito.


En septembro de 1947 li vojaĝis al Bazela hospitalo, por kuraci sian hepatomalsanon: Amikoj kaj eldonistoj

peris tiun ĉi eblecon al la intertempe konata aŭtoro. Lia sanstato tamen jam estis tiel malbona, ke li mortis tie la 20-an de novembro, en la aĝo de 26 jaroj.

Fonto :

https://eo.wikipedia.org/wiki/Wolfgang_Borchert

Kial tiom da komencantoj?



Kial tiom da « eternaj komencantoj » ? Kelkaj malgrandaj pripensoj.

Kiam mi komencis lerni Esperanton, mi estis tiel entuziasma pri la lingvo, ke mi tiam pensis tute naive, ke preskaŭ ĉiuj esperantistoj post kelka tempo de lernado regas bone la lingvon. Bedaŭrinde, observante jaron post jaro la esperantistan medion, mi rapide konstatis, ke la realo ne estas tia. Kial ? Ŝajnas al mi , ke ekzistas pluraj kialoj.

1- La plimulto de la esperantistoj lernas la lingvon tro supraĵe. Post la akiro de bazaj konoj, multaj ĉesas lerni konsiderante, ke sufiĉas praktiki la lingvon de tempo al tempo. Tiel agante ili ne nur ne plu progresas, sed ankaŭ forgesas iom post iom la jamajn lernitaĵojn. Eĉ facila lingvo kiel Esperanto, necesigas minimumon da laboro, se oni deziras atingi kontentigan nivelon.

2- Tro multe da esperantistoj lernas en neefika maniero. Ekzemple por kio servas lerni la signifon de vortoj, se oni ne lernas samtempe uzi ilin ĝuste en frazoj ? Ĉiufoje kiam oni renkontas novan vorton, estus bone lerni samtempe ekzemplojn de ĝia uzo, ludi kun la finaĵoj, afiksoj, kunmetaĵoj kaj tiel lerni utiligi la senliman kreokapablon de nia bela lingvo. Nu, kie trovi ekzemplojn de frazoj enhavantaj la koncernajn vortojn ? Tiucele ne mankas iloj je nia dispono. Mi mencias nur du el ili :

-- La Plena Ilustrita Vortaro (PIV) (<http://vortaro.net>) estas neelĉerpebla fonto da informoj ; multaj kapvortoj estas ilustritaj per ekzemploj ofte Zamenhofaj ;

-- « Tekstaro de Esperanto » (<http://tekstaro.com>) estas tre utila paĝaro. Ĝi estas kolekto da verkoj de famaj esperantaj verkistoj. Kiam ni havas dubon pri la uzo de iu ajn vorto, la sistemo montras al ni frazojn

Sendis Paule Burnel el Francujo

enhavantajn ĉi tiun vorton. Tiamaniere ni povas vidi kuntekste kiel uzis ĝin Zamenhof aŭ aliaj famaj verkistoj.

3- Alia kialo kiu estigas « eternajn komencantojn » estas la fakto, ke kelkaj esperantistoj opinias, ke gravas nur scii paroli dum aliaj opinias, ke gravas nur scii skribi. Laŭ mi unuj kaj la aliaj malpravas. Scii paroli kompreneble tre gravas, ne estas bezonate longe argumenti pri tio. Sed ĉu tio sufiĉas por bone regi lingvon ? Antaŭ kelka tempo mi legis artikolon de lingvosciencisto titolitan « Por scii paroli, oni devas scii skribi ». Mi tute konsentas pri ĉi tiu aserto. Fakte oni ofte konstatas, ke ne regas bone Esperanton la esperantistoj, kiuj neniam praktikas skribi la lingvon, kontentiĝante nur paroli okaze; ili stumblas kaj ofte hezitas pri la vortoj uzendaj, ne sciante ĉu ili uzu « ia », « io », aŭ « iu » ? Ĉu « ig » aŭ « iĝ » ? Ĉu indikativan modon, aŭ volitivon ? Ktp... Male kiuj kutimas praktiki skribi la lingvon, tiuj parolas kun pli granda facileco. Kial ? Tial, ke skribante, oni havas pli da tempo por pripensi, oni povas korekti siajn erarojn kaj tiel enkapigi al si taŭgajn esprimmanierojn, dum kiuj praktikas la lingvon nur parole, tiuj emas esprimi sin uzante laŭvorte la parolturnojn de la gepatra lingvo. Alidirete ili parolas esperanton paŭsitane laŭ la denaska lingvo : francoj parolas “franceskan” Esperanton, angloj “angleskan” Esperanton...

Konklude por bone studi Esperanton, estas nepre necese ne nur aŭskulti kaj paroli, sed ankaŭ legi kaj skribi. Korespondi kun alilandanoj estas interalie tre bona trejnado por plibonigi iom post iom sian lingvoscion.

Sendis Paule Burnel (Francujo)



<http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco/38-noticias-esperanto/noticia/320-festivalo-seniors-almerio>

Dekdu argumentoj kontraŭ kaj por Esperanto

Kial ne adopti Esperanton?

Kial tamen adopti Esperanton?

1. Esperanto ne estas vivanta, natura lingvo, sed sen-tradicia, artefarita lingvo.

Esperanto fakte estas "artefarita", planita lingvo, sed ĝi estas bazita sur plurajn "naturajn", etnajn lingvojn, profitante el ties tradicioj. Do Esperanto kunigas la avantaĝojn de ambaŭ kategorioj de lingvoj, kaj ĝi estas speciale konvena por komputila uzo, interalie pro la eta nombro de sinonimoj kaj homonimoj. Ĝi estas vaste parolata – evoluinta je vivanta lingvo.

2. Esperanton estigis amatoroj, ne kompetentaj, profesiaj lingvistoj.

Esperanton fakte iniciatis ne lingvisto, sed kuracisto, kiu parolis plurajn lingvojn. Sed poste ankaŭ profesiaj lingvistoj kontribuis al ĝia disvolvo. Sekve de tio Esperanto posedas ĉiujn avantaĝojn de la ĉiutaga praktiko kaj scienca teorio kombinitaj.

3. La strukturo de Esperanto estas trosimpligita, kaj ĝia vortrezoro estas malriĉa.

La strukturo de Esperanto zorgeme gardis la necesajn elementojn de la gramatiko kaj sintakso. Ĝia simpleco estas fleksebleco sen komplikeco kaj stabileco sen rigideco. La vortrezoron de Esperanto daŭre pliriĉigas regula formado de novaj vortoj kaj terminoj (ekz. artefarita intelekto), kaj transpreno de necesaj kaj utilaj neologismoj el aliaj – kaj ne nur hind-eŭropeaj – lingvoj;... - ekz. nunatako el la eskima (inuita), saŭno el la finna, hanuko el la hebrea, cunamo el la japana, kaj obo el la mongola.

4. Esperanto ne konvenas por la stila diverseco de la beletraĵoj.

Depost sia naskiĝo en 1887, Esperanto produktis vastan kaj varian beletron. Tio konsistas ne nur el miloj da tradukitaj poeziaj kaj prozaj verkoj, sed ankaŭ el multe da originalaĵoj, kolektitaj kaj gardataj en grandaj bibliotekoj, ekz. en Budapeŝto, Londono, Roterdamo kaj Vieno.

5. Esperanto ne havas "animon", ne reprezentas kaj komunikas specifan kulturen heredaĵon.

Estas vero ke Esperanto ne havas etnan "animon" limigitan al iu specifa popolo aŭ kulturo. Anstataŭ tio ĝi havas "universan animon", kiu estas malfermita, tolerema kaj faciliganta senperan komunikadon inter malsamaj popoloj kaj kulturoj en la epoko de neevitebla tutglobiĝo.

6. Esperanto ne taŭgas por uzo en scienco kaj tekniko.

Esperanto jam estas – almenaŭ parte – adaptita al la bezonoj de modernaj scienco kaj tekniko, kaj larĝe ĉeestas sur la interreto. Ĝiaj karakterizaj ecoj (vidu punkton 3) ebligas kaj certigas daŭran disvolviĝon ankaŭ sur tiuj kampoj, de Astronomio al Zoologio (ekz. nebulozo, Primatoj ktp.)

7. La Fundamenton de Esperanto la esperantistoj konsideras netuŝebla tabuo, kaj la Akademio de Esperanto estas tre konservativa institucio.

La "tabuo" pri la Fundamento de Esperanto estas nur ilo por garantii la bazan unuecon de la lingvo kaj preventi ties dialektiĝon. La Akademio de Esperanto neniel estas netrompema, sed ĝiaj membroj faras seriozajn kaj sincerajn fortostreĉojn por trovi kaj konservi racian ekvilibron inter la ekstremoj de blinda dogmismo kaj neresponeca anarkio, severa konservativismo kaj absoluta libereco.

8. Precipe tiaj homoj lernas Esperanton, kiuj ne sukcesis alproprigi ajnan vivantan fremdan lingvon.

Estas fakto ke Esperanton oni povas ellerni pli facile, pli rapide kaj pli malmultekoste ol praktike iun ajn etnan lingvon. Pro tio ĝin speciale bonvenigas tiuj homoj kiuj pro ia kaŭzo malfacile alproprigas fremdan lingvon. Evidente Esperanto estas eĉ pli facila por tiuj, kiuj jam parolas alian (hind-eŭropan) lingvon, de la afrikansa kaj albana ĝis lakimra kaj jida.

9. Lerni Esperanton estas perdo de tempo, energio kaj mono. Havus pli da senco investi tiujn en la lernadon de vere utila lingvo, ekz. de la angla, germana aŭ hispana.

Evidentiĝis ke Esperanto estas utila kiel lingvolanĉilo. Ĝia scio helpas kaj faciligas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj, inkluzive la anglan. Por uloj kies gepatra lingvo ne estas hind-eŭropa (ekz. araba, ĉina, estona, finna, hungara, japana, korea, malaja, mongola, turka, vjetnama) Esperanto estas kvazaŭ rabat-preza enirbileto al tiu grupo de lingvoj.

10. Esperanto havas nek fortan ekonomian bazon, nek potencajn subtenantojn.

Esperanto ne estas ligita al iu ajn financa grupo, nacia aŭ multnacia, nek estas altrudita al la homoj de iu agresema politika aŭ milita potenco. Sekve ĝi estas vere neŭtrala kaj relative sen-diskriminacia.

11. Adopti Esperanton signifus ke oni devus lukti kun unu lingvo pli.

Adopti Esperanton signifus ekhavi neŭtralan, interkulturan "pontlingvon".

12. La endonduko de Esperanto estigus gravajn problemojn, ekz.

La problemoj rezultantaj el la adopto de Esperanto estas multe malpli gravaj ol tiuj de la nuntempa, tre multekosta lingva kaoso (speciale en la Eŭropa Unio).

- La denaskaj parolantoj de la angla, kaj tiuj kiuj elspezis multe da tempo, energio kaj mono por ellerni ĝin, perdus sian avantaĝon kaj kelkajn siajn privilegiojn.

- La angla (kaj la franca ktp.) estus daŭre uzataj en multaj terenoj, kaj iliaj denaskaj parolantoj restus relative privilegiitaj.

- Multaj tradukistoj kaj interpretistoj ne estus plu bezonataj.

- Multe da tradukistoj estus bezonataj por esperantigi la multegon da dokumentoj.

- Multege da dokumentoj devus esti esperantigitaj.

- Ankaŭ interpretistoj restus necesaj ĝis kiam la tuta homaro estus ellerninta Esperanton, zorgeme konservante la valoran diversecon de kulturoj kaj lingvoj.

Bonvolu kompari sen antaŭjuĝo, konsideri la aferon, kaj tiri konkludon.

Fonto: © Dudich, Endre (Hungario) 07.06. 2008

<http://egalite.hu/inf/argueo.htm>

Malnovaj Grekaj Mitoj : La Diluvo

Eduard Petiška

LA DILUVO

(Malnova greka mito)



Al la diopatro penetris la sciigo, kiom fiiĝis la homoj,

Meznivela Legaĵo

kaj ke ili eĉ ne hezitas entrepreni krimojn. Li decidis malsuprengrimpri sur la teron por konvinkiĝi per propraj okuloj, ĉu la homoj efektive rabas kaj murdas, ĉu ili preferas la mensogon kompare al la vero kaj mokegas la diojn. Afliktite kaj kun kolero li ekkonis ĉie, kie li aperis, ke la homoj estas ankoraŭ pli fiaj ol ilia famo. Oni priŝtelis la aliajn kaj eĉ ridis al ties vizaĝoj. Gastigantoj atakis la dormantajn gastojn kaj mortbatis ilin, infanoj ĝojis pri la morto de siaj gepatroj kaj sopire atendis la heredaĵon, edzinoj venenigis sian edzon kaj fratoj uzis la arkon kontraŭ la frato. Zeŭso sentis sin pli bonfarte en senhoma roka tristejo ol en la urboj kaj vilaĝoj de la homoj.

Iam vespere Zeŭso venis en la palacon de la reĝo de Arkadio, al Likaono. La homoj ekkonis, ke proksimiĝis dio kaj komencis preĝi. Sed Likaono mokis ilin. Li tenis kaptitajn virojn el la gento de la molosoj. Lun el ili li mortbatis kaj ordonis kuiru lin. Kiam la vojaĝantoj estos satiĝintaj de la homa viando kaj profunde dormos, li volis mortigi ilin.

Servistoj portis al Zeŭso pelvojn kun vaporantaj manĝoj. Ekkoninte, per kiu terura manĝo la reĝo lin regaligis, li ekkoleregis. Li ĵetegis fulmon sur la palacon de la krima reĝo Likaono kaj orelsurdiga tondro disvastiĝis en la tuta reĝolando. Ĉie elpafiĝis flamoj kaj voris avide la posedon de la reĝo. Likaono mem fuĝis kun mortotimo el la brulanta palaco kaj provis fuĝi de la kolero de Zeŭso. Li malfermis la buŝon, sed pro timo li eĉ ne kapablis eligi sonon. Kiam li fine reakiris la voĉon kaj volis ekkrii, el lia buŝo aŭdiĝis hurlado. Li falis sur siajn brakojn kaj gambojn kaj sentis kiel sur la korpo kreskas felo, kiel lia vizaĝo tordiĝas en hundecan buŝegon, el Likaono fariĝis lupoj, kiu eterne soifas pri sango. Ekde tiu tempo li ŝteliras ĉirkaŭ la sin paŝtantaj gregoj kaj liaj okuloj sovaĝe radias tiel, kiel tiam, kiam li ankoraŭ estis reĝo.

Zeŭso reiris en la ĉielon kaj kunvokis la konsilion de la dioj. La dioj rapide kuris trans la Lakta Vojo en la marmoran halon, en kiu Zeŭso sidis morne kaj pripenseme sur sia trono. Apenaŭ ili kolektiĝis, eksonis la voĉo de la diopatro. Li raportis, kion li vidis kaj travivis surtere.

„Unu palacon mi jam frakasis per fulmo“, li diris, „sed necesas puni ĉiujn homojn. Mi neniigus ilin per la fajroj de miaj fulmoj, sed mi timas, ke tia grandega brulo povus transiri ankaŭ ĉielen. Ni ĉiuj konas la aŭguron, ke iutage tero, maro kaj ĉielo ekflamiĝos kaj forbruliĝos la mondo. Tial mi intencas sendi grandan diluvon sur la teron kaj liberigos ĝin de la fieco de l' homa gento.“

Kaj Zeŭso enfermigis la nordoventon, kiu forpelas la nubojn, en kavernon kaj la sudoventon li ellasis. La sudovento batis per la malsekaj flugiloj kaj ekflugis. Sur lia frunto sidis densa nebulo kaj el la griza barbo torentis pluvo. Per la dekstra li premis kaj ŝiris nigran nubegon, el kiu torentis pluvolverŝiĝoj. La mara dio Pozidono helpis al sia frato Zeŭso. Li alvokis ĉiujn riverajn diojn kaj ordonis al ili, ke la torentoj ŝvelu kaj eliru la bordojn, por ke la digo kunrompiĝu, kaj por ke la loĝejoj de la homoj estu inundataj. Jen grimpis la riveroj el siaj riverujoj kaj inundis vilaĝojn kaj urbojn, kovris grenokampojn, arbustojn kaj arbojn. La akvo grimpis trans la tegmentojn de la domoj kaj kovris baldaŭ eĉ la pintojn de la turoj. La homoj naĝante provis savi sin, sed la vipanta pluvo fordrivigis ilin, kaj nur malmultaj sukcesis atingi la montopintojn. Sed baldaŭ suprengrimpis la akvo ankaŭ ĝis super la pintoj kaj forlavis la homojn en la profundojn de la nova senborda maro. Aliaj surboatiĝis kaj surŝipiĝis kaj

batalis sur la koleraĵoj pri la nuda vivo. Ili fiaskiĝis pro la rokaj klifoj, kiuj antaŭ nelonge ankoraŭ estis la krestoj de la plej altaj montoj. Scivolaj fiŝoj naĝis profunde sub la marnivelo tra arbokronoj kaj svarmis en la domoj kaj temploj, kies fenestroj kaj pordoj pro la sturmantaj ondoj estis enpremitaj. Cervoj, virkaproj kaj lupoj batalis vane kontraŭ la ondoj, kaj en la arbaroj loĝis delfenoj. La kontinentoj transformiĝis en ununuran maron. Ankaŭ diversaj birdoj falis en la akvon, ĉar ili nenie povis ripozi. Tiuj, kiujn la ondoj ne voris, mortis pro malsato.

En la regiono Focio elstaris ankoraŭ la monto Parnaso en la inundo. Tien stiris arkeo kun Deŭkaliono, jen filo de Zeŭso kaj ties edzino Pirro. Prometeo avertis ilin sufiĉe frutempe kaj donis al ili firman ŝipeton. Kiam Zeŭso ekkonis, ke de la tuta homaro postrestis nur Deŭkaliono kaj Pirro, lojalaj, honestaj kaj diotimaj homoj, li dispelis la nubojn kaj montris al la tero la ĉielon kaj al la ĉielo la teron. Ankaŭ Pozidono, kiu per tridenta forko malserenigis la maron, metis flanken la tridenton, li alvokis sian filon Tritonon, ke li blovu sian sian gigantan konkotrumpeton. Tritono povis blovi tiom forte, ke tio aŭskulteblis en la tuta mondo. Li blovis kaj la akvo komencis sinki, la riveroj reiris en siajn riverujojn kaj la maro inter siajn bordojn.

Deŭkaliono kaj Pirro surteriĝis ĉe la monto Parnaso, falis sur la genuojn kaj dankis al la dioj por sia savo. Poste ili ĉirkaŭrigardis kaj vidis nur tristan teron. En la branĉoj de la arboj pendis ankoraŭ la ŝlimo, kaj ĉio estis kvietita, sen vivo. Deŭkaliono ĝemis: „Kara Pirro, nur ni ambaŭ postrestis de la homaro. Kion ni faru? Se mi nur, kiel mia patro Prometeo, povus doni al la argilo homan formon kaj enspiri vivon!“ Kun ploroj en la okuloj preĝis Deŭkaliono kaj Pirro sur la ŝtupoj de preskaŭ tute ruiniĝinta kaj per mosko prikreskata templo de la diino Temiso, la patrino de Prometeo. Ili petegis ŝin, ke ŝi helpu al ili revokigi la mortan teron je nova vivo.

La diino estis kortuŝita kaj konsilis al ili: „Paŝu el la templo, vualigu viajn kapojn kaj ĵetu malantaŭ vin la ostojn de la granda patrino!“

Profunde enpense ili paŝis el la templo eksteren. Ili ne povis kompreni, kiel la diino povis postuli de ili ĝeni la pacon de siaj antaŭuloj. Longe ili cerbumis. Subite Deŭkaliono havis la ideon, ke kiel patrino estis celata la diino de la tero.

„Tero estas por ĉiu el ni la granda patrino“, diris

Deŭkaliono, „kaj ŝiaj ŝtonoj povas esti nur ŝtonoj en la argilo.“

Sed li dubis, ke la ŝtonoj povus vivi la teran surfacon. Tamen li kaj Pirro kolektis ŝtonojn kaj ĵetis ilin malantaŭ sin. Kaj jen okazis miraklo. Apenaŭ falis la ŝtonoj surteren, ili perdis sian duron, kaj kio je ili estis malseka, fariĝis karno. Kio estis je la ŝtonoj dura kaj necedema, ŝanĝiĝis en ostojn, kaj la vejnoj el la ŝtonoj fariĝis vejnoj en la homa korpo. La ŝtonoj, kiujn ĵetis Deŭkaliono, fariĝis viroj, kaj tiuj, kiujn ĵetis Pirro, fariĝis inoj.

Tiel ekestis nova homa gento, nelacigebla en la laboro kaj rezistema kontraŭ suferoj kaj doloroj. Ĝi devenis

de la ŝtonoj kaj estis malcedema kaj dura kiel ili.

Tradukis Donjo & Cezar laŭ la ĉeĥa originalo „Staré řecké báje a pověsti“ de la eldonejo ALBATROS en Prago

Korektis Vladimir Türk

Fonto:

<http://www.ipernity.com/blog/cezar/4526050>

aŭ

http://cezartradukoj.blogspot.gr/2016/04/malnovaj-grekaj-mitoj-eduard-petiska-la_1.html

Vortareto		fordriviĝi	uzaĝa sŭrŭklenmek		vurmak
		gento	aynı aileden insan	neniigi	ortadan kaldırmak
afliktite	üzülmüş olarak		grubu	paŝtanta	otlayan
aŭguro	alâmet	grego	sŭrŭ	pelvo	pelvis
diluvo	sel	heredaĵo	miras	priŝteli	soymak
diopatro	tanrı babası	hurlado	inleme, hırlama	rabi	soymak
dura	sert, sağlam	kresto	sorguĉ	ŝteliri	gizlice gitmek
ellasi	dışarı salmak	malcedema	acımasız	torenti	akıntı, sel ile
enfermigi	içeri kapatmak	mokegi	kötü şekilde dalga		doldurmak
entrepreni	girişmek, bir işe başlamak	moki	geçerek eğlenmek	tridento	ucu üçlü çatal
fiiĝo	kötüleşme, yanlış yola sapma	mortbati	eğlenmek, dalga geçmek	vori	şeklinde mızrak yutmak
			ölüm darbesi		

Ĉu EU sen la angla?



Kiom da esperantistoj revadis pri elekto de Esperanto kiel oficiala neŭtrala lingvo por la Eŭropa Unio! Kiom da ni

leteradis al membroj de la Eŭropa Parlamento por substreki la bonajn ecojn de nia internacia lingvo! Kaj nun iuj el ni kredas, ke la eliro de Britio el EU donos novan ŝancon al la lingvo de Zamenhof.

Post la voĉdonado en Britio multaj en EU ekesperis ke la “Brit-eliro” donos novan memfidon kaj emon al EU post kvardek jaroj de la kontraŭema brita membreco. Ankaŭ en la lingva kampo iuj esperas je ŝanĝo de la reala lingva sistemo de EU. Sed certe estas tro frue por esperi, ke Esperanto fariĝos la nova lingvo.

Multaj franclingvaj aktivistoj kaj politikistoj pripensas la novajn ŝancojn de la franca por regajni la spacon perditan dum jardekoj pro la disvastiĝo de la angla.

La lingva “sistemo” de la Eŭropa Unio estas bazita sur la regulo №1 de la jaro 1958a. Efektive, ĉiuj membro-ŝtatoj de EU elektas lingvon, kiu hejme estas konstitucia lingvo, kaj ĉiuj aliaj EU-landoj devas konsenti kun la elekto.

La prezidantino de la parlamenta konstitucia komitato Danuta Hubner opinias, ke post la Brit-eliro restas neniu membro-ŝtato, kiu elektis la anglan kiel sian oficialan EU-lingvon. Kaj ŝi pravas. Irlando elektis la irlandan, ĉar jam la angla estis oficiala EU-lingvo.....

Vi povas legi la tutan artikolon en la Balta Ondo ĉe <http://sezonoj.ru/2016/08/bruselo-32>

Forpasis Detlev Blanke (1941-2016)



D-ro Detlev Blanke, unu el la plej renomaj nuntempaj interlingvistoj, forpasis la 20-an de aŭgusto en Berlino. Li naskiĝis la 30-an de majo 1941. Blanke lernis E-on memstare en 1957. Li doktoriĝis en 1976 per disertacio pri kompara vortfarado de Eo kaj la germana (Plansprache und Nationalsprache), kaj akiris docentan diplomon en 1985 per disertacio pri planlingvoj (Internationale Plansprachen). En 1988 li fariĝis docento pri interlingvistiko en la Berlina Humboldt-Universitato, kie li daŭre prelegis ĝis 2007.

Blanke estis sekretario de Centra Laborrondo Eo en la Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko 1968-1980 kaj ekde 1981 de Eo-Asocio en Kulturligo de GDR, kiu en 1991 unuiĝis kun Germana Eo-Asocio. Kiel sekretario li ankaŭ redaktis la revuon *der esperantist*. De 1974 li estis estrarano de Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), kies bultenon *Informilo por Interlingvistoj* li redaktis ekde 1992. De 1992 ĝis 2013 li kompilis (kun H. Tonkin) bibliografion pri Eo kaj interlingvistiko por la usona Modern Language Association.

Unu el la iniciatoj de Blanke estas la Esperantologiaj Konferencoj, okazantaj en ĉiu UK ekde 1978. Li organizis ĉ. 20 el ili kaj redaktis la aktojn de pluraj. En 1991 Blanke kunfondis *Gesellschaft für Interlinguistik* (Societo pri Interlingvistiko; GIL). Li estis ĝia prezidanto ĝis 2011 kaj redaktis ĝian bultenon kaj la aktojn de multaj GIL-konferencoj.

Blanke prelegis en multaj Eoo-renkontiĝoj, lingvistikaj konferencoj k.a. aranĝoj en multaj landoj. Li estis ege fekunda aŭtoro kaj redaktoro: la bibliografio de liaj publikaĵoj ampleksas pli ol 1200 unuojn. Kun sia edzino Wera li laboris i.a. pri terminologio kaj iniciatis la fondon de Terminologia Eo-Centro de UEA en 1987. Pro meritoj en la terminologia kampo ambaŭ estis premiitaj de Infoterm per la Eugen-Wüster-Medalo en 2006. Pro sia interlingvistika agado Blanke ricevis ankaŭ la estonan premion *Academicus Paul Ariste*.

Detlev Blanke estis komitatano de UEA 1978-1998 kaj membro de diversaj komisionoj kaj laborgrupoj, i.a. kiel juĝanto pri eseoj por la Belartaj Konkursoj de UEA ekde 1980. Li estis ankaŭ membro de LKK de la 84-a UK en Berlino en 1999. En 2011 li estis elektita Honora Membro de UEA.

Fonto: <http://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2016/>

Forpasis Reinhard Selten (1930-2016)



La 23-an de aŭgusto Esperantujo perdis sian plej eminentan scienciston per la forpaso de prof. d-ro Reinhard Selten, naskiĝinta la 5-an de oktobro 1930. En 1961 li doktoriĝis pri matematiko en la Goethe-Universitato de Frankfurto-ĉe-Majno, kie en 1968 li akiris docentan diplomon. En la studjaro 1967-


1968 li estis gastprofesoro en la Universitato de Kalifornio en Berkeley. Li estis profesoro en la Libera Universitato de Berlino 1969-1972, en la Universitato de Bielefeld 1972-1984 kaj ekde 1984 en la Universitato de Bonn. De 2006 ĝis 2014 li gvidis esplorprojekton pri eksperimenta ekonomiko de la Nordrejn-Vestfalia Akademio de Sciencoj kaj Artoj. Dek unu universitatoj asignis al li honoran doktorecon. En oktobro 1994 Selten fariĝis, kun du usonaj ekonomikistoj, laŭreato de la Nobel-premio pri ekonomiko pro sia elstara kontribuo al la ludoteorio. Krom pri ludoteorio, Selten faris pioniran esploradon pri eksperimenta ekonomiko kaj pri limigita racieco. En lia ampleksa scienca bibliografio, ĉefe en la germana kaj angla, troviĝas ankaŭ la verko *Ĉu mi lernu Eon?* Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj (1982; 2-a eld. 1995), kunaŭtorita kun Jonathan Pool.

Pri sia esperantistiĝo Selten mem rakontis jene: "Mi komencis lerni Eon kiel 17-jarulo aŭtodidakte. Fakte, mi vidis kaj legetis Eo-libron jam pli frue en Breslau, kie mi vivis ĝis februaro 1945. Mia patro estis esperantisto, sufiĉe aktiva en la blindula Eo-movado. Tamen, la lingvon mi eklernis ne sub lia rekta instigo, nur sufiĉe longe post lia morto." En Frankfurto (ĉ.1960) li ekzameniĝis kiel Eo-instruisto kaj estis vicprezidanto de la loka klubo. Li konatiĝis kun sia edzino pere de Eo kaj instruis la lingvon ankaŭ al sia pli juna frato. Li estis, same kiel la edzino, dumviva membro de UEA ekde 1969 kaj membris ankaŭ en Germana Eo-Asocio kaj Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS). En la 84-a UK en Berlino (1999) li estis rektoro de la Internacia Kongresa Universitato.

Sub la redaktora nomo de Selten aperis la diverslingve eldonita studkolekto *La kostoj de la eŭropa lingva (ne)komunikado* en 1997. Kun Helmar Frank li publikigis la libron *Für Zweisprachigkeit in Europa*; Por dulingveco en Eŭropo (2005). En la Eŭropa Parlamento Selten pledis por Eo kiel invitita parolanto la 9-an de majo 2007, okaze de la 50-jariĝo de la Roma Traktato. En la eŭropaj elektoj en 2009 li estis la ĉefkandidato de la germana sekcio de la partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto. En la 80-a UK en Tampere en 1995 Reinhard Selten estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

Fonto: [http://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Forpasis-Reinhard-Selten-\(1930-2016\)](http://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Forpasis-Reinhard-Selten-(1930-2016))

La lingvo serena de Baldur Ragnarsson



Mia sinteno al Esperanto jam tiam estis favore formiĝanta post entuziasma trimonata studado, mi estis ravita de ĝia sereneco – ĝia fonetika skribmaniero, ĝia vortofara travidebleco, ĝia celado al alta idealo, similas al serena ĉielo, – tiel mi pensis. [...]

Tian senton pri Esperanto kiel *lingvo serena* mi transportis tute senbare kaj nature en ĝian literaturan mondon.

B. Ragnarsson, *Esperanto-literaturo: iluzio, miraklo aŭ simpla fakto*

poemaroj mi trovis lernolibron de Esperanto. [...] Mi aĉetis tiun libron pro scivolemo kaj eble kun iom neklare intenco ĝin iam trastudi. Tiam mi havis 14 jarojn. Sekvis du jaroj en duagrada lernejo. La tempo por Esperanto ankoraŭ ne venis. [...] Unuajara gimnaziano iun tagon mi rimarkis en montrofenestro de librovendejo libron, kies titolo tuj frapis min rememorige pri

Tutkorajn bondezirojn al eminenta esperantisto!

La 25-an de aŭgusto okazas la 86-a naskiĝdato de nia islanda elstara poeto-verkisto Baldur Ragnarsson.

Antaŭ deksesoj da jaroj, kiel freŝbakita esperantisto (kvankam jam 56-jaraĝa), mi ekkonis lin per lia artikolo pri Julio Baghy en la rubriko "Nia kultura heredaĵo" de la revuo Juna Amiko, kiun li daŭre prizorgas.

La unua verko de Ragnarsson, kiun mi vere frandis, estis la historia romano "Sagao de Njal", kiun li tradukis en Esperanton el la islanda lingvo. Nur kiam, post 40 jaroj, mi finfine forlasis la alienigan informadkan mondon kaj ekinteresiĝis ankaŭ pri poezio mi malkovris lin kiel poeton kaj eseiston.

El lia plena originala verkaro "La lingvo serena" eldonita en 2007 mi deziras konatigi al vi du miaopinie tiklajn malkovrojn.

Unue, kiel nia poeto-verkisto priskribas sian esperantiĝon:

"Mian knabaĝon mi pasigis en vilaĝo ĉe unu el la multaj fjordoj, kiuj tranĉas la bordojn de Orienta Islando. Ambaŭflanke de tiu fjordo altaj montoj levas siajn pintojn al la ĉielo. La fjordo mem estas profunda kaj riĉa je fiŝoj. [...] Dum la vintro la infanoj kompreneble devis ĉeesti la lernejon, la solan en la vilaĝo. En tiu lernejo instruis mia patro. [...] Li edukiĝis en la Pedagogia Lernejo en la ĉefurbo Rejkjaviko. Unu el liaj kunstudantoj tie estis fervora esperantisto. Li havis la kutimon saluti la kunulojn matene en Esperanto: "Bonan tagon!". Tion diris al mi mia patro. [...]

En mia hejma vilaĝo estis ŝuisto, kiu tenis malgrandan librovendejon en ĉambro apud sia laborejo. Tie inter popularaj romanoj, biografiaj libroj kaj tradiciaj

mia knabaĝa intereso. [...] [Tie mi trafis] la unuan lernolibron de Esperanto en la islanda lingvo, eldonitan en 1909."

Tiel komenciĝis la mirinda simbiozo inter Baldur Ragnarsson kaj Esperanto.

Mia dua tikla malkovro rilatas al liaj poeziaĵoj. En la ĉapitro titolita "Islandecaj reeĥoj" nia poeto priskribas antikvan islandan literaturan ĝenron "Kortega poezio" kun specialaj poetika lingvouzo kaj stilo. Jen liaj ĉirilataj vortoj:

"... La kortegaj poemoj verŝajne estas netradukeblaj en kiun ajn lingvon, kvankam la versoformo mem estas sufiĉe bone transdonebla, precipe en Esperanto, efektive mi jam ĝin uzis por originala poemo, kiu ĉi tiel komenciĝas:

*Verŝas benon brila suno
sur la tero kaj l'aero,
kisas monton dolĉa vento
blovetante zumas kanton.
Al la maro mi deziras
gaje kuri por plezuro,
vidi ondojn laŭe randi
blankan bordon de la fjordo.*

Ĉi tiu strofo transdonas sufiĉe fidele la versoformon [...] kun ok linioj po ok silaboj kaj kun internaj rimoj, alterne plenaj kaj duonplenaj. La citita strofo tamen malhavas aliteracion, kiu estas nepra regulo en la malnova islanda poezio".

Jen do: ĉu ankaŭ vin tiklas la scivolemo enketi plue kaj malkovri, nur por via propra kontentigo, tiajn poeziajn ludojn?

Ĉar dank' al Baldur Ragnarsson mi fakte konatiĝis kun Julio Baghy kaj lia poemeto "Ĉe samovaro", kiam lastjare, ĝuste en aŭgusto, mi finpreparis esperantan filmeton "Sur la spuroj de Julio Baghy en Budapeŝto", mi dediĉis ĝin al li. Se vi deziras spekti la filmeton jen ĉi-sube ĝia ligilo: <https://vimeo.com/25273503>

Olimpikaj Ludoj, la metaforo



Finiĝis la olimpikaj ludoj, en Rio. Ne eblas ne pensi pri ĉiuj simbolaj reprezentoj, kiujn ĝi alportas al la tutmonda publiko. Miliardoj da televidantoj spektas la konkurojn, ĉie. Kaj la olimpikoj estas metaforo de la mondo mem.

Sporto estas oportuna maniero vidi la mondon per aliaj lensoj. Ĝi taŭgas kiel trafa dramigo de la homa socia vivo sur nia planedo.

En la antikva tempo, en Helenujo, oni kreis la ludojn kiel manieron marki la tempopasadon kaj glori la heroecon de konkeroj kaj forto. Noble estis submeti la kontraŭulon kaj montri sian propran superecon. Jam tiutempe virinoj havis siajn proprajn konkurojn.

En la 19-a jarcento, je iniciato de la franca barono Coubertain, oni restarigis la ludojn. La barono estis pedagogiisto kaj intencis plibonigi la edukadon de gejunuloj per sporto. La ideo estis kunfratigi la homaron, kaj tion bele esprimas la malsamkoloraj kvin cirkloj, kiuj simbolas la kvin kontinentojn. Oni stimulas ne nur konkuradon, sed ankaŭ afablecon inter kontraŭuloj. Amikeco inter la popoloj, jen la devizo.

En la praktiko, la ludoj iom post iom ricevis ian aspekton de granda milito, de ĉiuj kontraŭ ĉiuj. La grandaj ekonomiaj potencoj (kiel en la reala mondo!) superas la "etajn" teamojn. La premio mem, por la venkintoj, havas fortan ekonomian signifon: oro, arĝento, bronzo materiigas la valoron de homaj faroj. Afableco ne ĉiam regas; male, foje akraj akuzoj kaj eĉ personaj batoj forigas la deziratan "fair play". La lingvo

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis Gian Piero Savio el Israelo

Fonto:

<http://esperantaretradio.blogspot.com.co/2016/08/a-lingvo-serena-de-baldur-ragnarsson.html?view=flipcard>

franca, de la idealisma barono, ankoraŭ estas oficiala, sed la ĉieninvada angla lingvo laŭte sonas. La spektantaro kantas, krias, blasfemas, ploras, ululas, ne ĉiam respektante ĉiujn konkurantojn. Atletoj, kiuj ne gajnas medalojn sentas sin humiligitaj, post ekstrema klopodado por atingi la altan sportan nivelon por partopreni la ludojn.

Tamen, ĉu oni ne rajtas celebri, ke la olimpikoj fine prezentas pozitivan rezulton? Jes! Dum du semajnoj, la popolo en Brazilo, kiu travivas teruran ekonomian kaj politikan krizon, ĉion forgesis por ridi, kanti, ululi, emociiĝi, admiri la heroajn atletojn kaj iliajn belajn prezentojn. En ĉiu partopreninta lando kreskas la sento de kuneco kaj, se ne de internacia solidareco, almenaŭ de pli da unuiĝo interne de ĉiu patrolando. Premiigis homoj, kiuj atingas vere admirindajn farojn en sporto, kaj tio estas ekzemplo por la novaj generacioj: ekzemplo de obstino, sindediĉo kaj memfido. Fine, montriĝas, ke lando kia estas Brazilo, kun tiom da sociaj problemoj, sukcesis okazigi grandan feston, kiu dum kelkaj tagoj feliĉigis la popolojn.

Kelkaj kritikis, sed certe Zeŭso, en Olimpo, aplaudis.

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis Paŭlo Sergio Viana el Brazilo

Fonto:

<http://esperantaretradio.blogspot.gr/2016/08/olimpi-kaj-ludoj-la-metaforo.html?view=flipcard>



CEZAR
LERNU ESPERANTON

Lasu lingvan vanton.
Lernu Esperanton.

Lingvo, dua en potenco,
estas monda konsekvenco.

>>>



Estis fino de januaro 1976. Mi havis mian devigan 2-jaran militservon en soveta armeo. Dum la januaro mi feris en la hejmo en Estonio kaj kiam restis la plej lastaj tagoj antaŭ reiro mi vespere estante jam en la lito prenis en la manojn lernolibron

(kiun mi estis aĉetinta nur pro tio ke mi ŝatas aĉeti diversajn librojn kaj la lernolibro de Esperanto estis tre maldika). Mi ĵus fariĝis 22-jara kaj miaj lingvoscipovoj estis ne tre bonaj. Sed kiam mi komencis legi mi trovis tuj ke nenio komplika aŭ malfacila estas en Esperanto. Do mi tralegis 2-3 lecionojn kaj kunprenis la lernolibron en armeon. Mi nenion sciis pri esperato-aferoj krom la mallonga klarigo en komenco de la lernolibro kio diris ke temas pri la internacia lingvo.

Ĉar mi trovis la lingvon facila kaj ĉar mi komprenis ĝian taŭgecon por solvi la mondan lingvoproblemon, mi daŭrigis lernadon. Mia nova servloko estis Kaliningrad (Rusio) kie mi restis ĝis majo 1977.

Ĉar soldato de soveta armeo rajtis havi nur malmultajn personajn aĵojn kaj nenion rajtis kunporti dumtage, mi kaŝis la lernolibron kaj konstante kunportis ĝin surbruste sub la vestoj. Pro la ŝvito la libro fariĝis malbonaspekta kaj ĝia kovrilo nigriĝis sed tio ne gravis. Mi penis ĉiutage lerni. Kiam mi havis eblon por momento flankeniĝi de aliaj mi laŭtleĝis voĉe. Mia inspirita lernado ekinterestigis ankaŭ aliajn. Trafinte en hospitalon eklernis de mi (malgraŭ mia komencanteco) unu studento de milita aviada lernejo. Ni kune reskribis al la tutan gramatikon kaj ankaŭ la vortaron kio estis en la lernolibro. La vortaro estis esperanto-estona kaj mi estis estono kiu ne tre bone posedis la rusan lingvon do tradukado de ĝi en la rusan estis ne facila kaj por kelkaj vortoj ni serĉis rusan signifon longe. Al tiu aviad-studento Esperanto ekplaĉis kaj ni skribis ankaŭ por lia amiko kajeron da esperanto-lernomaterialoj.

Ekde komenco de mia militservado mi amikiĝis kun unu estono kies nomo estas ankaŭ Peeter. Ankaŭ li ekinteresiĝis pri Esperanto kaj permane reskribis la tutan lernolibron (post jaroj li ekkorespondis esperante, mendis librojn, abonis iun gazeton...). Kiam mi estis traleginta-lerninta la lernolibron unu fojon mi komencis ripete de komenco. Post la kvina leciono mi trovis ke esperante estas pli facile rimversi ol en aliaj lingvoj kaj por la ligvopraktiko mi post tralego de ĉiu sekva leciono provis verki iun versaĵeton uzante nur gramatikon kaj vortojn kiuj estis en antaŭa parto de la lernolibro. La rezulto estis kompreneble ne poezio sed bona ekzercado certe.

Mi korespondis kun unu mia amiko velisto en Estonio kaj kiam li eksciis ke mi lernas esperanton, li informis ke lia kolego en veljaktfabriko ankaŭ estas iom ligita kun Esperanto. Do li akiris por mi kelkajn adresoj de esperantistoj el "HdE" kaj informis pri Pola Radio (kaj sendis al mi ankaŭ unu beletristikan libron en E-o). Mi trifoje skribis al la adreso de iu juna estona esperantistino sed ne ricevis respondon. Sed mi sukcesis ricevi respondon de unu hungara esperantisto (uzante por korespondado ne la armean adreson). Mi ankoraŭ nenion sciis pri la movado, pri ĝia historio kaj atingoj kaj mi multe cerbumis pri tio kion necesus fari por ke E-o kiel racia solvo de la monda lingvoproblemo sukcesu.

Mi jam ne precize memoras la tempon sed eble jaron post eklernado, kiam mi estis jam eksciinta ke Pola Radio dissendas esperante, mi aŭdis Esperanton la unuan fojon. En la soveta armeo soldatoj kaj serĝentoj ne rajtis havi radioricevilojn. Sed nia superserĝento kiuj mastrumis ankaŭ vestejon havis tie (kaŝe) radioaparaton por aŭskulti muzikon. Foje mi sukcesis peti de li la radioricevilon por momento por aŭdi kiel sonas esperanto. Post minuta serĉado mi trovis la ĝustan ondolongon kaj... kaj ekaŭdis Esperanton. Oni parolis tro rapide por kompreni la enhavon, sed tio ne gravis. Mi povis aŭskulti nur kelkajn frazojn sed mi estis feliĉa - Esperanto sonis ĝuste tia, kia mi opiniis laŭ la prononcindikoj en la lernolibro.

Mia liberiĝo de la deviga militservo okazis en majo 1977 kaj reveturante hejmen mi konsideris min jam parolanto de Esperanto.

Fonto: <https://peeteraitai.blogspot.gr/2007/01/kial-kaj-kiel-mi-lernis-esperanton.html>

>>>

Ĉar ĝi en la mond' radikas,
ĝi progreson jam implikas.

Homoj de la tuta tero,
lernu por pli alta sfero.

Komunume ekparolu,
pace en la mondo rolu.

Verkis:
Hans-Georg Kaiser

Fonto:
[http://www.ipernity.com/
blog/cezar/4631898](http://www.ipernity.com/blog/cezar/4631898)

Poemoj de Evgenij Georgiev - Espopore (Kazaĥio)

Ni renkontiĝu en surteraj barikado

Ni renkontiĝu en surteraj barikadoj,
Sen la prokrasto en la voj-libret'.
Amuzas nin akregaj pafoj kaj blokadoj --
De niaj vivoj magra liberet'.

Ne flari florojn, sed eksplodan nigran fumon,
Ĉi sorto povas esti sola sort'.
Se suĉi mondon, pretu trovi firm-cicumon
Kiun donace donas nova mort'.


Amiko falas. Restas nur la stiro sanga.
En ies kor' kaj rekte sur asfalt'.
Forgesos ĉion vi, prospera kaj ruĝvanga,
Sed nur ne tiun ŝtalan krion "Halt!"

Ni renkontiĝu en ĉielaj barikadoj,
dubinda loko... Eble iluzi'.
Sed niaj revoj, niaj devoj, niaj ardoj
Ja karnon donos al nia fantazi'...

Varmego

Tutplene vanas tiuj fulm' kaj tord' --
Finfine, pluv' kiel fantom' degelas.
Sub suno resti, -- nigras la humor',
Kaj polvo brula sur la kap' sigelas.

Dezirus min en kanon turni mi
Aŭ en kristalon, en malvarm' ekreĝi.
Sed infanaĝe ĉio simplis pli:
Tuj venus pluv', se danci plu aŭ preĝi...



Du Fu (ĉina poeto)
Tradukis Espopore

Espopore

Vivas vi en viaj faroj - Poemo de Pedro Salinas

Vivas vi en viaj faroj.
Fingro-pinte vi elplukas
el la mondo, krom aŭroroj,
venkoj kaj koloroj, ĝojojn:
jen via muzik'. La vivo
estas l' o de vi tuŝata.

—
Nur el via okul-paro
fluas la lumo gvidanta
vin. Vi travojas
kion vi vidas. Solsole.

—
Kaj, se dubo al vi signas
dek mil kilometrojn for,
vi lasas ĉion, impetas
sur flugilojn kaj sur pruojn.
Jen vi tie tuj. La dubon
vi kise, dente disŝiras.
Ne plu estas dubo.
Dubon ne eltenas vi.

—
Ĉar vi jam ĉiujn misterojn
transturnis. Viaj enigmoj,
l' o ĉiam al vi obskura,
ĝuste tio pleje klaras:
la tik-tak' viahorloĝa,
la sablo por via kuŝ'

kaj la roze milda korpo,
kiun spegule vi trovas
ĉiutage ĉe vekiĝ':
via korpo. Mirindaĵoj
tute deĉifritaj jam.

—
Kaj neniam vi eraris,
krom unu fojon, la nokton,
kiam vin allogis ombro
—la sola, kiun vi ŝatis—
la ombro tio ŝajnis.
Kaj vi volis ĝin brakumi.
Estis mi.

Tradukita el la hispana de **Miguel Fernández**
Verkita de **Pedro Salinas**

Fonto:
<http://poemoj.net/vivas-vi-en-viaj-faroj-pedro-salinas-esperanto/>



Ŝercoj

En trajna vagono sidas du vojaĝantoj.

- "Ĉu vi povus fermi la fenestron ĉe via flanko, mi petas. Ekstere regas granda malvarmego."
- "Mi povus fari tion kompreneble. Sed tio tamen ne ŝanĝos la temperaturon ekstere."

Edzino ĉagreniĝas pro la neatentemo kaj neglektado fare de la edzo. Ŝi ploretante sidas ĉe amikino kaj rakontas sian mizeron. Tiu konsilas:

- "Aktoru dramaĵon antaŭ via edzo, paku valizon, kaj veturu al via patrino. Li certe pentos kaj petos vin reveni!"

Du semajnojn poste ili reenkontiĝas. La amikino demandas:

- "Nu, ĉu li ne faris, kiel mi aŭguris al vi?"

La edzino diris:

- "Ĝis nun ne. Sed kiam post mi pakis miajn aferojn kaj mi portis miajn valizojn al la taksio, li staris en la unua etaĝo de nia domo kaj tra la fenestro ĉion filmis per sia poŝtelefono."

Krucvort-enigmo

Horizontale

1. Tre konata de la publiko. Ornami tekston per bildoj aŭ desegnaĵoj rilataj al ĝi.
2. Numeralo esprimanta la nombron post 0 en la serio de la entjeroj. Tio, pri kio oni okupiĝas, kion oni faras aŭ intencas fari.
3. Apartenanta al la naturo, konforma al ĝiaj leĝoj. La deksepa grafemo de la E-a alfabeto. Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj, formantaj unu tuton.
4. Abelsvarmo. Respekte honori, precipe per oferprezento.
5. La dua grafemo de la E-a alfabeto. Ĝenerala nomo por ĉia akvogveturilo sufiĉe malgranda por esti pelata per remiloj (kun aŭ sen motoro aŭ velo). Prep., montranta la kaŭzon de ago.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13
1					■								■
2				■		■						■	
3											■		
4								■					
5			■						■				■
6		■		■	■	■					■		
7										■			■
8	■			■	■					■			
9													■
10	■		■							■		■	

Enigmo

Tri logikemuloj sidas en restoracio kaj esperas je deserto. La vendistino venas kaj demandas:

- "Ĉu ĉiu el vi volas mendi nian specialan glaci-deserton?"

La unua : "Mi ne scias!"

La dua : "Mi ne scias!"

La tria : "Jes!"

Do, kiel la tria logikemulo certigis ke ĉiu de la aliaj volas deserton kaj respondis "Jes"? Vidu la klarigon en la fina paĝo.

La ŝercojn kaj enigmon sendis nia germana amiko Fritz-Ferdinand L. Palatinus



6. Refleksiva proomo uzata nur por la tria persono. Simbolo de boro. Pronomo uzata por referenci al virseksa estaĵo.

7. Cirkloforma ornamo kiun oni portas ĉe la orelo. La kvociento de la perimetro de cirklo per ĝia diametro.
8. Esti atinginta la aĝon de. Egipcia dio. Kora aŭ seksa inklino al iu.
9. Japania industria havenurbo. Substanco, enhavanta ketogrupon (>C=O).
10. Esprimo de ies estra volo.

Vertikale

1. Malĝoja sento pro ies morto, pro malfeliĉego.

2. Birdo el la ordo de anseroformaj, kun mallonga kolo kaj egallarĝa beko. Tuto de sinsekvaj generacioj, rigardata kiel devenanta de unu sama prapatro.
3. Ne posedanta parol- aŭ son-kapablo. Rilata al seĝo.
4. Ronda kaveto meze de la ventro de mamuloj.
5. Parto de la tersurfaco, konsiderata el aparta vidpunkto. Tiu metal' uzata en juvelarto.
6. Diserig' en la konsistigantajn elementojn.
7. La sesa tono en la relativa solfeĝo. Sufkso esprimanta pasivon por ankoraŭ ne okazinta procezo. Prefikso montranta rilaton al la komplemento.
8. Interjekcio esprimanta faciliĝon post laceco, penado ks. Plant' kies grajnoj estas mueleblaj kaj ofte uzataj por fari farunon.
9. Dormanta organo, maturiĝinta ovolo, konsistanta el

- embrio ĉirkaŭita de ŝirmaj histoj kaj eventuale de rezervaj histoj. Ĝenerala nomo por ĉia akvoveturilo sufiĉe malgranda por esti pelata per remiloj (kun aŭ sen motoro aŭ velo).
10. Ago intence erarigi por sia profito aŭ pro nura malico.
11. La 21a grafemo de la E-a alfabeto. Kolekt' de objektoj. Manĝaĵo farita el knedita, fermentigita kaj bakita faruno.
12. Aĝo, trans kiu oficisto, specialisto k.a. ne plu rajtas daŭrigi sian profesion, kaj devas emeritiĝi.
13. Numeralo, esprimanta la nombron post 2 en la serio de la entjeroj.

La solvo troviĝas en la lasta paĝo de la revueto.

Veganarto

Strogonofo el terpomo, kukurbeto kaj ĉampinjono.

Strogonofo aŭ stroganofo estas rusa plado de la 19a jarcento, onidire, ĝin kreis ĉefkuiristo kiu laboris por la rusa militisto, duko Pavel Aleksandroviĉ Stroganov. Ĝi ekiĝis kadre de kuirkonkurso en Peterburgo. De tie ĝi disvastiĝis en Ĉinion, Usonon kaj Brazilon inter aliaj landoj! Kutime ĝi estas manĝata kun spagetoj aŭ rizo. Sed oni povas manĝi ĝin kun kio ajn oni deziru :)



La manĝaĵo tradicia enhavis viandopecojn de bovino, cepo, ĉampinjonoj kaj acidkremo. Poste la recepto suferis plurajn ŝanĝojn en pluraj landoj sed restis la ideo. Mi volas prezenti al vi tre facilan recepton kaj same bongustegan!

Por fari ĝin vi povas uzi haketitan viandon el sojo sed se vi ne havas ĝin, simple kun legomoj kaj ĉampinjonoj sufiĉas. Mi iom hezitis ne aldoni la sojviandon sed fine tre kontentis pri la rezulto! Ankaŭ mi mem faris la kremon el aveno, ĝi postulas nur avenflokajn kaj akvon!

Ingrediencoj:

- 1 Kukurbeto (se ĝi grandas, nur la duono sufiĉos)
- 1 mezgranda terpomo
- 150 gramoj da ĉampinjonoj
- 1 cepo

- 2 ajleroj
- 4 kuleroj da oleo
- 4 kuleroj da mustardo
- Duontaso da tomatsaŭco
- Spicoj (laŭplaĉe)
- Salo

Por la kremo:

250 gramoj da avenflokaj kaj la duoblo da akvo. Lasu ilin ripozi en la miksaparato dum 30 minutoj. Post tio, kirlu kaj filtru ĝin kaj la kremo estas farita.

Preparmaniero:

- 1- Senŝeligu la kukurbeton kaj la terpomon kaj faru malgrandetajn pecojn, kun kvadrata formo estus pli bone. Same tranĉu la cepon sed ne kvadrata. Tranĉu ĝin pli longe kaj fajne! Laŭ la juliana tranĉostilo. Tranĉu lamene la ĉampinjonojn (ankaŭ eblas aĉeti ilin jam lamenigitaj)
- 2- Aldonu iom da oleo en kuirpoto kaj aldonu la cepon kaj lasu ĝin friti kaj sekve aldonu la ajlerojn kaj la distranĉitan terpomon. Movu ĝin kaj post kelkaj sekundoj aldonu la kukurbopecojn, salon kaj spicojn laŭplaĉe kaj sekve aldonu la ĉampinjonjn.
- 3- Aldonu nun la avenkremojn kaj la tomatsaŭcon kaj la mustardon kaj bone kirlu ĝin por ke ĝi iĝu sameca.
- 4- Kun tre malalta faro, aldonu al la kremo tomatsaŭcon kaj mustardon kaj ade kirlu ĝin de tempo al tempo ĝis kuiriĝo de la terpomoj kaj kukurbetoj!
- 5- Servu ĝin prefere kun rizo aŭ spagetoj! Kaj ek! bonan apetiton!

Fonto: <http://veganarto.net/strogonofo-el-terpomo-kukurbeto-kaj-campinjono/>

VeganArto

Vortareto	spagetoj	uzun makarna	sojo	soya fasulyesi	avenfloko	spico	baharat
terpomo	patates	rizo	pirinĉ	haketita kiyılmış	ajlero	diŝ sarmisak	kirli karıştırılmak
kukurbeto	kabak	acidkremo	legomo	sebze	mustardo	hardal	miksaparato mikser
ĉampinjono	mantar	cepo	soĝan	aveno	tomatosaŭco	salĉa	

Vilaĝanoj mistere vivas subtere de generacio al generacio jam de 4 mil jaroj



En la gubernio Shaanxian de Henan-provinco troviĝas imponaj popolaj arkitekturaj mirakloj, kiuj surprizas la vizitantojn kaj ĉinajn kaj alilandajn. Tio estas loĝejoj kun kavo-kortoj subtere distingiĝintaj per "oni vidas nur arbojn, tamen ne vilaĝon, sed vilaĝon tamen ne loĝdomojn, kaj aŭdas bruojn tamen ne vidas homojn." Sur Shaanyuan-altebenaĵo sin kaŝas vilaĝoj el 10 miloj da strangaj loĝejoj. Neinformite, probable oni ne povas imagi ke tio fakte estas vilaĝo.




Tiuj loĝejoj kun kavo-kortoj subtere havas historion de pli ol 4 mil jaroj. Nuntempe ekzistas ankoraŭ pli ol 100 subteraj vilaĝoj, kaj la plej malnovaj loĝejoj ankoraŭ loĝataj de pli ol 6 generacioj aĝas jam pli ol 200 jarojn. Tieaj vilaĝoj plej bone konservitaj estas vilaĝoj Renmazhai kaj Miaoshang k.a.

Laŭdire, la tiea vetero estas varmega en somero kaj malvarmega en vintro. Kaj tiuj loĝejoj kun kavo-kortoj subtere tre komfortas pro varmo dum vintro kaj malvarmo dum somero.

Unika estas tiu magia arkitektura arto de subtera konstruado! Tiuj loĝejoj kun kavo-kortoj propraj al Henan estis konstruitaj en ebena leŭsa tero, oni fosis kavojn en kvadrata aŭ rektangula formo kun lateroj

longaj je 10-12 metroj kaj profundo de 6-7 metroj. Tio estis farita de malnova generacio dum 2-3 jaroj, kaj tie vivas ĝiaj posteuloj de generacio al generacio dum centoj da jaroj.

En kavo-kortoj estas ĉefa kavernĉambro, kavernsalono, kavernkuirejo kaj aliaj. Ankaŭ



ili, influitaj de tradicia kulturo, atentis pri la direkto kien rigardas la fenestroj.

8-12 kavernoj estis fositaj ĉe 4 flankoj de la kavo-korto, kaj en kies angulo oni fosis deklivan pasejon de la kavo-korto al la tero-surfaco kiel enirejon.

Tra tiu kavernenirejo 10 metroj longa oni povas eniri en la kavo-korton kvazaŭ ekspedicio al mistera tunelo. Tio estas vere eksterordinara sperto por tiuj, kiuj al kutimiĝis al la vivo surtere.



Ĉe la randoj ĉirkaŭ la kavo-korto estas talusŝirmaĵo kiel tiu de tegmento por lasi forfluo de akvo kaj sube -- leŭsaj kavernoj kaj muroj. Por loĝejo en kavo akvodrenado nature estas unue grava afero. Tial, la lokanoj fosis ĉi tie en la mezo de la kavo-korto trasorbigan fosaĵon profundan de 4-5 metroj speciale por kolekti akvon de pluvo.

Redaktoro: Wang Lihua

Fonto: http://www.espero.com.cn/2016-06/20/content_38704459.htm



kiam io okazos.

Longe ili atendis. Ĉio estis silenta kaj malluma, ĉar la luno ankoraŭ ne aperis, kaj la ĉielo estis kovrita de nuboj. Malforta venteto blovis el la direkto de la vilaĝo, kaj post longa atendo Andreo aŭdis horloĝon, kiu batis la horon. Li kredis, ke jam estas noktomezo, sed la horloĝo sonis nur dekfoje! Do, estis nur la deka horo ... la nokto ja forpasis malrapide! La knabo esperis, ke io baldaŭ okazos, kaj ankaŭ ke Lizbeta ankoraŭ maldormas, ĉar ili ne povis atendi en la sama ĉambro dum la geonkloj estis supre.

Pasis plua duonhoro, kaj subite la oreloj de Andreo kaptis sonon. Iu moviĝis. Tiam li aŭdis mallaŭtajn paŝojn, kiuj preterpasis lian ĉambron kaj malsupreniris la ŝtuparon. Tiam pordo fermiĝis malsupre, kaj post momento li aŭdis la murmuradon de voĉoj.

Silente li malfermis la pordon de la dormĉambro, kaj iris per paŝo de lupo al tiu de la fratino. Kiam li eniris, la ĉambro estis tiel malluma, ke unue li ne povis vidi Lizbetan, sed li aŭdis flustron, kaj fine li povis vidi ŝin apud la fenestro.

"Ili iris malsupren," li flustris. "Nun ni devas atendi ĝis kiam li eliros. Mi portis kun mi mian palton, kaj en la lito mi aranĝis kapkusenon tiel, ke se iu rigardos, tiu kredos, ke mi dormas. Antaŭ ol eliri ni faros simile ĉe la via."

Denove ili devis longe atendi, kaj la malproksima horloĝo batis la dekunuan antaŭ ol ili aŭdis iun moviĝon malsupre. Tiam ili aŭdis sonon, kvazaŭ iu movas seĝon. Pordo malfermiĝis kaj paŝoj sonis ĉe la ŝtuparo.

Venis jaŭdo kaj la ĝemeloj apenaŭ povis manĝi pro ekscito. Andreo elprenis keston el la lignobudo kaj metis ĝin apud la muron. Ĉio estis preta. Je la naŭa horo vespere, kiel kutime, la familio iris al la dormĉambroj, sed Andreo kaj Lizbeta ne demetis la vestojn. Ili atendos sendorme, ĝis

"Rapide!" flustris Andreo. "En la liton!" Kaj en la sama momento li malaperis sub la lito. La paŝoj haltis ĉe la ĉambro de Andreo kaj oni malfermis la pordon. Post momento ĝi refermiĝis, kaj la paŝoj venis laŭ la koridoro. Tiam la pordo de la ĉambro de Lizbeta malfermiĝis, kaj de sub la lito Andreo vidis, ke estas onklino Maria, kiu envenis kun kandelo en la mano. Ŝi rigardis la lito, en kiu Lizbeta ŝajne dormis, kaj tiam eliris kaj refermis la pordon.

Kiam ŝiaj paŝoj ne plu sonis ĉe la ŝtuparo, Andreo elvenis de sub la lito.

"Ŝajne ŝi estas kontenta," li flustris. "Ŝi kredas, ke mi estas en mia lito."

Li rapide aranĝis la lito, kaj ili surmetis la paltojn. Baldaŭ ili denove aŭdis paŝojn malsupre, kaj tiam venis la sono de la dompordo, kiun oni malfermis kaj poste refermis.

"Nun," diris Andreo. "Rigardu tra la fenestro; li devas veni laŭ ĉi tiu flanko de la domo."

Post kelkaj momentoj, tra la mallumo ili vidis pli malluman ombron, kiu silente moviĝis. Kiam ĝi jam forpasis, Andreo malfermis la fenestron.

"Jen li," li diris. "Silente, nun, venu!" Kaj ili eliris, grimpis trans la tegmento de la lignobudo, kaj saltis de tie al la tero. Kelkajn metrojn for ili povis vidi la formon de la farmisto, kiu silente iris en la direkto de la landlimo. Egale silente la ĝemeloj sekvis.

Ili bone konis la vojeton, ĉar ili ofte promenis tie dum la taglumo, sed nokto ĝi aspektis malsimila. La arboj staris kiel nigraj gardostarantoj, kaj mallaŭte murmuris en la veneto. La gefratoj ĝojis, ke ili surmetis la palton, ĉar la nokta aero estis malvarma. Ili tremis, sed tio estis en la mezo de la granda aventuro, pri kio ili pensis dum multaj tagoj.

Unu fojon la farmisto haltis kaj turniĝis, kvazaŭ li aŭdis ilin, kaj ili staris senmove malantaŭ arbeto. Sed li ekmarŝis denove, kaj silente kiel ombroj la ĝemeloj sekvis lin.

Subite li turniĝis dekstren kaj malaperis. Kiam la junuloj venis al la loko, ili trovis malgrandan vojeton trans la kampo. Ili jam estis inter la montetoj nun, kaj estis pli malfacile sekvi la farmiston. La formo de la

viro ĉiam iris antaŭ ili, ĝis subite ĝi malaperis. Andreo kaj Lizbeta haltis pro timo, ke li vidis ilin kaj atendas ilian alvenon. Sed la minutoj pasis, kaj li ne reaperis, do la gefratoj malrapide iris antaŭen pro serĉi signon, kiu montros, kien li iris.

Estis multaj arbetoj kaj ŝtonegoj, kaj ili serĉis ĉirkaŭ multaj antaŭ ol Lizbeta faris krieton. Andreo iris al ŝi, kaj vidis, ke ŝi montras ion per la mano.

"Vidu tiun arbeton kun ŝtonego apud ĝi," ŝi flustris.
"Estas truo en la tero malantaŭ ĝi. Mi preskaŭ enfalis."

Andreo rigardis kaj vidis nigran truon. Li sidiĝis ĉe la rando, kaj enmetis la kruojn. Li ne povis tuŝi la malsupron, do li tenis la arbeton per la manoj, kaj mallevis la korpon en la truon. Li trovis, ke li staras sur la tero, do li lasis la arbeton kaj ĉirkaŭrigardis. Ĉe unu flanko estis plua truo. Ĝi estis la enirejo de subtera tunelo, tiel bone kaŝita, ke ordinare oni certe ne povus trovi ĝin. Li helpis Lizbetan eniri en la truon, kaj kune ili eniris la tunelon. Post kelkaj paŝoj ĝi estis sufiĉe alta kaj la geknaboj povis stari rekte, sed tiel mallarga ke ili devis marŝi unu malantaŭ la alia. Estis nenia turno, kaj Andreo, kiu iris antaŭe, devis uzi la manojn por trovi la vojton. Lizbeta tenis lian palton por ne perdi lin.

En la komenco la tunelo turniĝis de tempo al tempo, sed poste ĝi iris rekte, kaj ĉiam grade malsupren. Dum ili marŝis, malrapide pro la mallumo, ili aŭdis konstantan bruon, kiu ĉiam plilaŭtiĝis. Ĝi similis al la bruo de la trafiko en granda urbego.

Ili ne povis imagi, kio ĝi povas esti, ĝis finfine Andreo pensis pri la direkto, en kiu ili iris. Tiam li turnis la kapon kaj diris al Lizbeta:

"Tiu bruo. Ĝi estas la akvofalo. La tunelo devas konduki al iu loko apud ĝi."

Post kelkaj pluaj momentoj, malproksime antaŭ ili aperis malklara, griza lumeto. Eble ĝi estis la fino de la tunelo. Ili antaŭeniris, kaj iom post iom la griza lumo pligrandiĝis, sed ĝi preskaŭ ne pliheliĝis. Sendube ĝi estis la lunlumo, sed kiam ili proksimiĝis al ĝi, ĝi ŝajnis brileti en iu stranga maniero. La bruo de la akvofalo nun estis laŭtega.

Subite ili trovis sin ĉe la fino de la tunelo, kaj kia vidaĵo montriĝis al iliaj okuloj! Alia tunelo ŝajnis transiri tiun, laŭ kiu ili venis, sed la kontraŭa muro estis el vivanta akvo. La "tunelo" estis vojeto, kiu iris sub la akvofalo! La luno brilis tra la akvo, kiu rebrietis kaj lumigis la vojeton per arĝenta lumo.

Tio do estis la sekreta vojo de la kontrabandistoj! Supre, laŭ la bordo de la rivero, ĉiam marŝis kaj remarsis la gardistoj, sed ili neniam povus trovi tiun vojeton.

La ĝemeloj ne povis vidi vojeton ĉe la dekstra flanko, do ili iris maldekstren, kaj trovis pluan vojeton, kiu ŝajne kondukis for de la akvofalo.

Subite Andreo, kiu iris antaŭe, haltis kaj puŝis Lizbetan malantaŭen. Voĉoj sonis tre apude. Li preskaŭ montris sin al du viroj, kiuj sidis en angulo. Andreo rekonis unu voĉon, tiun de la onklo, sed ili ne restis tie. Se la viroj moviĝus, ili certe vidus la gefratojn, kaj kaptus ilin.

(daŭrigota)

Membrîgu en Esperantujo, jam 1,200 esperantistoj estas ĉi tie, sed nur 7 el Turkujo
<https://esperantujo.directory>

The image shows a screenshot of the Esperantujo website. At the top left, there is a white star logo with the text "Esperantujo LA ESPERANTISTA MONDMAPO". To the right of the logo are three small circular icons: a red one with a white bell, a green one with a white speech bubble, and a blue one with a white profile picture. Below the icons is a small profile picture of a man and the text "Vasil Kadifeli Elsaluti". The main part of the image is a world map with a grid of latitude and longitude lines. At the bottom of the map, the text "Ĉiuj Landoj 1200 ESPERANTISTOJ" is displayed in white.



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun Anselmo de Canterbury kaj Tomaso de Akvino.

Vasil Kadifeli

La Perfekta insulo - Anselmo de Canterbury kaj Tomaso de Akvino



Ĉiu havas sian opinion pri "Dio", eĉ tiuj kiuj ne kredas, ke Dio ekzistas. Laŭ la itala pastro **Anselmo**, komuna logiko montras, ke ĉiu havas ideon pri "Dio" kaj de tio li pruvis tra nekutima rezonado la ekziston de Dio. En sia libro "Proslogion" li komencas per la argumento: "Dio

estas la plej supera estaĵo kiu estas projektebla kaj super kiu ne povas esti alia. Se estus alia tiam, tiu estus Dio. Ĉiu havas imagon de Dio, kaj povas havi propran penson pri la ekzisto aŭ ne ekzisto de Dio. Sed ĉar Dio estas la plej supera estaĵo kaj do la plej supera ol tiuj imagoj, Dio ja ekzistas."


Vere tre nekutima rezonado ĝi estas. Sed tiu estis logika pruvo. Anselmo donis ekzemplon de pentristo, kiu antaŭe imagas la pentraĵon li faros, do la pentraĵo poste realiĝas. Sed "Dio" estas malsimila al tio. Se Dio ne ekzistus, oni ne povus imagi pri Dio. Se ni vere komprenas kio Dio estas, tiam ni komprenos, ke la neekzisto de Dio estas nebla.

Estas io, kio ne taŭgas en ĉi tiu rezonado. Nur malmulto de tiuj, kiuj kredas je Dio pensus laŭ tiu rezonado. Anselmo diris ke post tiu rezonado nur iu idioto dirus, ke Dio ne



ekzistas. Sed alia pastro, nomita **Gaunilo**, priskribis la rezonadon de tiu "idioto": "Imagu ke estas insulo kiun neniu povas atingi, kaj la insulo estas la plej perfekta,

la plej belega loko, kiu havas ĉion en ĝi. Se oni dirus, ke tia insulo ne ekzistas ni tion komprenus ĉar tio estas logika. Sed se oni dirus, ke ĉar tiu insulo estas la plej perfekta ol ĉiuj insuloj, tiu insulo devas ekzisti, tiam tiu rezonado ne estus logika." Gaunilo diris, ke iu, kiu uzas tiun rezonadon por provi konvinki vin, ke la insulo ekzistas, ĝi ja ŝercus. Gaunilo estis kredanto sed li tute ne ŝatis la malfortan pruvon de Anselmo. Tamen Anselmo insistis ke tiu rezonado estas aplikebla nur al "Dio" kaj ne al ia alia estaĵo. La perfekte de Dio ne estas la sama afero kiel la perfekte de insulo. Insuloj povas esti pli perfektigitaj sed Dio ne, ĝi estas la plej perfekta kaj ne povas esti pli perfektigota.



200 jaroj poste alia itala pastro, **Tomaso de Akvino**, kiu verkis la longan libron "Summa Theologica" menciis kvin argumentojn aŭ "kvin vojojn" por pruvi ke Dio ekzistas. La dua de tiuj argumentoj estas nomita "La argumento de la unusola kialo". Tiu argumento akceptas la

kialon de ĉio t.e. la kialon de la ekzistado de kosmo, kiel la komenca punkto. De kien ĉio venis? Kial ĉio ĉirkaŭ ni ekzistas? La plej simpla respondo estas ke ja ekzistas ia unua aŭ unusola kialo por ĉio. Estas io/iu, kiu kreis ĉion kaj tiu estas la kialo por la ekzisto de ĉio. Ni povas spuri la kialon de io, kaj poste spuri la kialon de tiu kialo, kaj la kialon de tiu kialo ktp. En la fino ni atingos la unuan unusolan kialon por ĉio. Se tiu spurado estus senfina tiam ne povus esti rezono por ĉio. Sed logike devas esti unusola kialo por ĉio. Se Akvino pravas, tiam estas io/iu, kiu kreis ĉion, kaj kiu ekzistis kaj ekzistas sen kialo. Akvino nomis tiun "Dio". "Dio estas la senkiala estaĵo kiu kreis ĉion."

En postaj jaroj multaj filozofoj respondis al Akvino. Kelkaj diris ke jes Akvino pravas sed tiu unua kaj unusola kialo ne nepre estas "Dio". Almenaŭ tiu kialo ne nepre posedas la karakterizaĵojn, kiujn religioj kondiĉas sur ĝi. Ekzemple tiu kialo ne nepre estas bona aŭ ĉiopova ktp.

(daŭrigota)

EL UNUA PARTO - TAŬO

06

La spirito de la valo ne mortas,
ĝi estas la mistera ino.
La pordego de la mistera ino
estas la radiko de Ĉielo kaj Tero.
Seninterrompe kaj persiste
ĝi efikas senpene.

(06) Rimarko de Cezar

Valo en la senco de malplenaĵo. La spirito de la valo tamen ne mortas, ĉar ĝi estas nedisigeble ligita al la materio. Spirito kaj materio kiel unueco estas eternaj. La pordego en la ĉina traduko de Wang Chongfang estas la „Mistera Femalo“.

Mi uzas la vorton „ino“ ĉiam kiel mallongigitan version de „ulino“, ĉar mi tiel protestas feministe kontraŭ tio, ke „ino“ estas en Esperanto nur „vir-ino“, do kvazaŭ „ripo“ de Adamo, la unua homo laŭ Biblio. Mia plej preferata vorto por ino estus „ulino“, kiu estus certe multe pli taŭga ol „virino“, tamen ankaŭ „ulino“ estus iom tro longa por ĉiutaga uzo. Iuj opinias, ke la „Valo“ simbolas la ineksan organon kaj sekve „la Spirito de la Valo“ simbolas per fekundeco la TAŬ-on, kiu estas la origino de ĉiuj estaĵoj.

07

Ĉielo estas eterna kaj Tero daŭra.
Ambaŭ estas daŭraj kaj eternaj;
ĉar ili ne vivas por si mem,
ili kapablas vivi eterne.

Tiel estas ankaŭ la saĝulo:
Li metas sian memon malantaŭen
kaj lia memo antaŭeniĝas.
Li ne konservas sian memon;
tamen lia memo restas konservita.
Ĉu ne estas tiel?
Ĉar li ne celas havi propran,
lia propreco perfektigas.

(07) Rimarkoj de Cezar

Laŭ Laocio oni atingas siajn personajn celojn ĝuste per tio, ke oni ne estas egoisto! Kiom vere! Plej fortaj estas ne la unuopaj egoismaj fortuloj, sed fortaj asocioj. Tian pensadon famigis ankaŭ la natursciencisto kaj anarkiisto Pjotr Kropotkin, kiu oponis la pensadon de la darvinistoj, ke la plej fortaj transvivas la aliajn. Laŭ li transvivas ĉiun alian tiuj, kiuj plej bone kunagadas en komunuma soci(et)o. Neegoista



agado de unuopuloj estas fakte komunuma agado, kiu utilas al ĉiu komunumano.

08

La plej granda boneco estas kiel la akvo.
La boneco de la akvo estas
servi al ĉiuj estaĵoj sen konkuro.
Ĝi restadas en lokoj, kiujn malestimas ĉiuj homoj.
Tial ĝi estas proksima al la TAŬO.
Ĉe la loĝado montriĝas la boneco je la loko,
ĉe la pensado je la profundo,
ĉe la donacado je la amo,
ĉe la parolado je la vero,
ĉe la administrado je la ordo,
ĉe la agado je la kapablo,
ĉe la movado je la ĝusta tempo.
Kiu ne konkuras kun aliaj,
tiu ĝuste tial restas libera de misoj.

(08) Rimarkoj de Cezar

La lasta frazo en alia germana traduko de la eldonejo Reclam, „Laudse Daudedsching“ de Ernst Schwarz tekstas tiel: „Nur tiu, kiu, kiel la akvo, kverelas kun neniu, estas sen sufero.“ Sed oni povus miskompreni tion!

(08) Rimarko de Wang Chongfang

„Venki malmolon per molo, retiriĝi por antaŭeniri kaj atingi sian celon per nekonkurado estas tri karakterizaĵoj de la pensmaniero de Laŭzi kaj la praktikado de lia penso.“

09

Voli firmteni ion kaj ĉe tio tro plenigi ĝin:
tio ne valoras la penon.
Uzi ion kaj ĉe tio ĉiam teni akra ĝin:
io tia ne konserveblas dum longa tempo.
Halon plenigitan per oro kaj juvelŝtonoj
oni ne povas protekti.
Esti riĉa kaj nobla kaj aldone orgojla:
Tio altiras per si mem la malfeliĉon.
Kiam la verko estas plenumita, tiam retiriĝu:
tio estas TAŬO de Ĉielo.

(09) Rimarko de Wang Chongfang

„En tiu ĉi ĉapitro Laŭzi montras la malavantaĝojn de nekontenteco kaj troeco kaj rekomendas modestecon kaj cedemon. Laŭ li, oni devas kontentigi sin per sufiĉeco kaj ne serĉi troajn riĉecon kaj honoron kaj, por longe ĝui trankvilecon kaj feliĉon, oni devas sekvi la leĝon de la Ĉielo, t.e. retiriĝi tuj post la plenumo de granda laboro, same kiel oni ĝustatempe demetas vazon jam ĝisrande plenan.“



Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde

bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

LA VERDA POMO

Sub la arbo en la ĝardeno estas ronda tablo.

Ĝardeno estas Johano el-venis el la domo en la ĝardenon.

Sur la ronda tablo estis pomo.

Johano vidis la pomon.

"Ho," diris li, "mi ŝatas pomon!"

Li prenis la pomon de la tablo, kaj manĝis ĝin.

Sed la pomo estis verda. Ĝi ne estis matura.

Johano est-os mal-sana!

Nun Johano estas malsana. Li devas iri al la lito!

Ho, Johano! Kial vi manĝis ne-maturan pomon?

Nun oni devas ven-ig-i la kuraciston.¹

"Roĝero! Roĝero! Kuru, rapide, kaj ven-ig-u la kurac-ist-on!"

"Certe, Panjo," diras Roĝero.

"Via frato estas malsana. Li manĝis verdan pomon. Kuru rapide! Li estas tre malsana."

Roĝero kuras rapide al la domo de la kuracisto.

La frapas laŭte ĉe la pordo.

La kuracisto malfermas la pordon.

"Kio estas?" demandas li.

"Mia eta frato estas malsana," diras Roĝero. "Venu, venu, mi petas."

"Kial li estas malsana?" demandas la kuracisto.

"Ĉar li manĝis verdan pomon," respondas Roĝero.

La kuracisto verŝas medikamenton en botelon. Tiam li kuras rapide al la domo de Sinjoro Muso.

"Kio okazis?" li demandas.

"Ho, mia knabeto Johano estas tre malsana," diras la patrino muso.

"Ĉu Johano Muso estas via filo?" demandis la kuracisto.

"Certe, Mi estas lia patrino, do li estas mia filo," respondas Sinjorino Muso. "Kaj li estas malsana. Li manĝis verdan pomon."

"Ho," diras la kuracisto al Johano. "Vi malbona knabeto. Ĉu vere vi manĝis verdan pomon?"

"Jes," respondas Johano.

"Kaj kial vi manĝis verdan pomon?"

"Ĉar mi ŝatas² verdajn pomojn," respondis la knabeto. "Verdaj pomoj estas bonaj."

"Ne, Johano. Verdaj pomoj estas malbonaj," diras la kuracisto. "Nun vi devas trinki ĉi tiun medikamenton."

"Sed mi ne ŝatas medikamenton. Mi preferas verdajn pomojn."

La kuracisto verŝas la medikamenton en glason.

"Trinku," li diras, kaj li donas ĝin al Johano.

Johano trinkas la medikamenton.

"Ne manĝu verdajn pomojn denove," diras la kuracisto.


La postan tagon Johano estis pli sana.

¹ Instru-ist-o estas persono, kiu instru-as; kurac-ist-o kuraca-as.


² Ni amas la patrinon; ni ŝatas robojn kaj manĝojn.




Johano manĝas
verdan pomon.



Li iras al la lito.



Roĝero kuras al la kurac-ist-o.




Li frapas ĉe la pordo



La kurac-isto mal-fermas
la pordon.



Li verŝas medikamenton
en glason.



Johano trinkas
la medikamenton.

Yeni kelimeler

certe	kesinlikle	medikamento	ilaç
ĉi	yakınlık belirten kelime ("tiu"=o, "ĉi tiu"=bu, "tie"=orası, "ĉi tie"=burası)	nematura	olgun olmayan, ham (ne-matura)
denove	yeniden, gene (de+nove)	petas	rica ediyor (fiilin mastar şekli "peti")
elveni	bir yerden dışarıya doğru gelmek (el+veni)	pli	daha fazla
ĝardeno	bahçe	pomo	elma
instruas	ders veriyor (fiilin mastar şekli "instrui")	posta	sonraki
knabeto	küçük erkek çocuk (knab-et-o)	prenis	aldı (fiilin mastar şekli "preni")
kuracas	tedavi ediyor (fiilin mastar şekli "kuraci")	sana	sağlıklı
kuracisto	doktor, tedavi eden kişi	ŝatas	beğeniyor (fiilin mastar şekli "ŝati")
kuru	koş (emir, fiilin mastar şekli "kuri")	trinki	içmek
malsana	hasta, sağlıklı olmayan (mal-sana)	venigi	gelmesini sağlamak (ven-ig-i) (fiilin mastar şekli "veni"=gelmek)
matura	olgun	vere	gerçekten
		verŝas	döküyor (fiilin mastar şekli "verŝi")
		vidis	gördü (fiilin mastar şekli "vidi")

Yeni ekler

-is	Fiiller için geçmiş zaman eki
-os	Fiiller için gelecek zaman eki

Dilbilgisi

ĉi	kelimesi yakınlık ifade eder. Örnek: tie=orada, ĉi tie=burada, tio=o, ĉi tio=bu, ĉijare=bu sene (zarf), ĉivespere= bu akşam (zarf) vs
-is -as -os	Fiil zamanları genel olarak bu üç ek ile ifade edilir. Geçmiş, Şimdiki, Gelecek zaman.
-u	Fiil emir kipi için ek

Akuzatif kullanımı hakkında

"Johano manĝas verda-n pomo-n"

Yukarıdaki cümledeki akuzatif ekleri "manĝas" fiilinin direkt objesini göstermek için kullanılır. Burada fiilin direkt objesi "verda pomo" ifadesidir ve hem sıfat hem isim akuzatif eki alırlar.

"La kuracisto verŝas medikamento-n en glaso-n"

Cümlesinde ise iki farklı akuzatif kullanımı vardır:

1) Birisi "verŝas" fiilinin direkt objesi olan "medikamento" kelimesine konulmuş ki bu bizim bildiğimiz normal akuzatif formudur.

2) İkincisi ise fiil ile ilişkisi olmayan "glaso" kelimesine konulmuştur. Bu akuzatif kullanımı cümledeki hareketi belirtmek için kullanılır fiil ile ilgisi yoktur. Hareketin "bardak"a doğru olduğunu gösterir.

Yani doktor "ilac-ı" "bardaĝ-a" "döküyor".



Kapaniŝ



ĉok ĉonemli.

Aĉliŝta bahsetiĝimuz Paul Burnel'in "Kial tiom da komencantoj?" yazısını herkes ama özellikle de başlangıç seviyesinde olanlar okumalı. Çünkü aynen İngilizce'de olduğu gibi binlerce kişi dili öğrenmeğe başlıyor ama sonra da başlangıç seviyesinde bırakıyor ve orada kalıyor. Esperanto'da da bu sendrom aynen mevcut. Ancak Esperanto diĝer dillere göre ĉok daha kolay geliŝtirilebilir. Bunun için kitap okumak,

yazmak, karalamak, başkaları ile yazıŝmak, facebook'taki Esperanto forumlarını takip etmek gerekir.

Önceki sayıların birinde de bahsettiĝim gibi Türkiye dil öğretren dersaneler enkazına sahip ülkelerden birisi. Buna ödenen paralar ĉok fazla ve bunların büyük bölümü yurtdıŝına gitmekte. Herkes dil öğrenmek için dersanelere kaydoluyor ama bazı istisnalar dıŝında eĝitim her zaman yarım kalıyor. Diĝer dillerde zor olsa da Esperanto'da kendimizi geliŝtirmemiz kolay ve elimizde olan bir ŝey.

Sonraki sayıda buluŝmak üzere, Hoŝcakalın...

STUDIO FARIĜOS VIDEO-RUBRIKO DE HEROLDO DE ESPERANTO

Sociala Grupo Lexus kaj Robert Poort, fondinto kaj ĝisnuna mastrumanto de la retejo Studio

(<http://novajhoj.weebly.com>) komunikas, ke okazis sukcesa diskutado pri la transdono de la uzo de la nomo Studio al Sociala Grupo Lexus. Alivorte, Studio fariĝos la video-rubriko de Heroldo kaj estos alirebla en la retadreso www.studio.heroldodeesperanto.com jam en la fino de la kuranta jaro.

Roberto Poort plu restos ligita al Studio kiel redaktoro de Studio, sed la tuta laboro estos kunordigita de la redakcia stabo de Heroldo. La teknika flanko rilate instalon kaj funkciadon de Studio en la nova retadreso estos afero nur de la profesia skipo de Sociala Grupo Lexus.

Rimarkindas, ke Studio daŭre funkcios tute normale en la nuna adreso ĝis la fino de la jaro,

kiam la reta versio de Heroldo de Esperanto estos alireblaj de ĉiuj esperantistoj. Fakte, parton de la reta versio de HdE estos alirebla nur de la abonantoj sed parto estos senpage alirebla de ĉiuj. Same okazos rilate Studion.

Bonvolu plenigi la formularon por potencialaj abonantoj de Heroldo: www.abono.heroldodeesperanto.org/index.html Ne temas pri sindevontigo aboni, sed regiŝtiĝo por ricevi unikajn informojn. Nur poste vi decidus ĉu vi abonos aŭ ne.



		O		O	N	O	D	R	O		O		10
	O	N	O	T	E	K		O	K	A	S	O	9
O	M	A		A	R		Z		I	G	A		8
	I	P		O	G	N	I	R	L	E	R	O	7
	L			O	B			L		S			6
	O	R	P		O	T	A	O	B		O		5
	I	G	A	M	O		O	N	E	M	A	S	4
	A			O	M			A	R	U	T	A	3
	T			O	R	E	F	A		A		U	2
		I	R	T	S	U	L	I		A	M	A	1
13	12	11	10	9	8	7	6	5	4	3	2	1	

Klarigo de la Enigmo:

Se la unua NE volus la deserton, li respondus "Ne!", ĉar tiel tute logike ne ĈIU el ili volus la glaciaĵon. Do li volas ĝin sed ne certas pri la aliaj. La dua scias ke la unua volas la deserton sed li ne certas pri la tria do respondas same. La tria scias nun, ke ambaŭ de la aliaj volas la deserton, kaj ĉar ankaŭ li volas ĝin, kaj tute logike ĈIU el la tri volas ĝin, li rajtas respondi: "Jes!"